


EL POPOLA ĈINIO

中國報通

7

1997


ISSN 0032 - 4361



*"Unu lando, du sistemoj"
en Hongkong*

Por loĝigi en novaj domoj

Proverboj en la ĉina lingvo



Ĉe sunsubiro

Foto de YANG SHIBIN

INTER NI

En la lastaj numeroj ni aperigis artikolojn pri la origino de la Hongkong-a problemo, la geografio, komerco, financo kaj socia vivo de Hongkong. La tuta mondo tre atentis la restarigon de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong, ankaŭ niaj legantoj deziras detalajn informojn pri tio, kaj aliflanke, la reveno de Hongkong al la patrolando estas historia evento de Ĉinio, ĉiu ĉino ĝojas kaj ni volantas prezenti la eventon al niaj legantoj.

Venas la 1-a de julio kaj la transdono de la regpotenco de la brita registaro super Hongkong al Ĉinio estas plenumita. Tamen Hongkong estos daŭre atentata. Oni volas informiĝi pri tio,

kiel aspektos la estonta Hongkong, ĉu vere la Hongkong-anoj mem regos sian distrikton, ĉu ĝi estos daŭre stabila kaj prospera..., ĉar Hongkong estas tre grava ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la tuta mondo.

La artikolo " 'Unu lando, du sistemoj' en Hongkong" helpas vin koni la nunan situacion de la distrikto.

"Proverboj en la ĉina lingvo", same kiel "Idiomoj en la ĉina lingvo" (3-a numero, 1996), estas interesa verko de Zhang Qicheng pri la ĉina lingvo. Bonvenaj estas opinioj kaj proponoj de niaj legantoj pri ĝi.

La Red.

El Popola Ĉinio

7 1997



Hongkong

Foto de Shen Yantai


Hongkong estas internacia komerca kaj financa havenurbo kun 6.31 milionoj da loĝantoj kaj areo de 1092 kvadrataj kilometroj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Hou Zhiping
Adreso: P.O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso:
+ 86-10-6832 1808

ENHAYO

- | | |
|---|---|
| 2 INTER NI | 28 Universitato investita de entreprenisto |
| 4 "Unu lando, du sistemoj" en Hongkong | 29 LAŬ LA SILKA VOJO: Plej okcidentaj pasejoj |
| 6 JUNULARO: Li penas por lernado kaj vivtenado | 36 ĈINA KULTURO: Proverboj en la ĉina lingvo |
| 10 Interparolo kun Istvan Ertl pri E-gazetoj | 38 Terglobaj riĉfontoj kaj kontinuigebla disvolviĝo |
| 12 ORIGINALE VERKITAJ: Poemoj | 40 ORDINARAJ ĈINOJ: Bonzinoj en Qiming-templo |
| 13 POR KOMENCANTOJ: Mia franca amiko | 42 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 14 ESP-NOVAĴOJ | 44 Bonnie Seyfer kaj pekinaj stratetoj |
| 15 SUR NIA LIBROBRETO: Moralo kaj amuzo per muzo | 46 Niujie, huj-a kvartalo en Pekino |
| 16 EKONOMIE: Por loĝigi en novaj domoj; Utiligo de nuklea energio; Kurantaj aferoj | 47 POR VIA SANO: 20 sanigaj ekzercoj (IV) |
| 18 Tibeta edukado en disvolviĝo | 48 Leĝoj en Ĉinio |
| 20 Unuaj loĝantoj de Pekino | 50 Diligentaj ekzercantoj de tajĝjiĉuan |
| 21 EN ĈINAJ URBETOJ: Fiŝistoj ĉe Erhai-lago | 51 ĈINAJ METIARTAĴOJ: Klozonea kruĉo |
| 24 Profunda sento de germanaj geedzoj | 2 Ĉe sunsubiro |
| 26 Hongkong hodiaŭ | SUR LA DORSKOVRILO: [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Sunleviĝo;
Ĉe Össjöasjön-lago |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|----------------------|----------------------------|
| 1. Hongkong (p. 4) | 2. Yunnan-provinco (p. 21) |
| 3. Yantai (p. 28) | 4. Wuhan (p. 24) |
| 5. Chongqing (p. 42) | |

“UNU LANDO, DU SISTE



S-ro Tung Chee Hwa

KARAJ legantoj, kiam vi legos tiun ĉi artikolon, vi jam trovos, ke la tuta Ĉinio estas en plena ĝojo. La 1-a de julio 1997 estos neforgesebla por la ĉinoj, ĉar en tiu tago finiĝis la pli-ol-100-jara koloniisma regado de Britio super Hongkong kaj Ĉinio restarigis suverenecon super ĝi.

PRI “UNU LANDO, DU SISTEMOJ”

La politiko de “unu lando, du sistemoj” iniciatita de ĉina gvidanto Deng Xiaoping signifas, ke kadre de la Ĉina Popola Respubliko, praktikigas socialisma sistemo en la ĉeftero kaj la kapitalisma en Hongkong (ĝi konvenas ankaŭ por solvi la problemojn pri Aomen kaj Taiwan). La du sistemoj harmonie kunekzistantaj en unu lando markas la unuigon de Ĉinio kaj helpas al ĝi prosperigon kaj potenciĝon.

Pri Hongkong Ĉinio de ĉiam restas ĉe la starpunkto, ke ĝi estas parto nedisigebla de la ĉina teritorio, kaj pledas por pace solvi la problemon pri Hongkong per inter-

traktado en konvena tempo. Tamen neniu certis, ĉu oni povos pace solvi ĝin kaj ĉu Hongkong povos kontinue teni stabilecon kaj prosperon post sia reveno al la patrujo. Kiel diris s-ro Huo Yingdong, fama entreprenisto de Hongkong, “Pro historiaj kaŭzoj kaj diferenco de sociaj sistemoj, des pli pro miskonduko de la publikaj opinioj far koloniistoj, en la lastaj jaroj iuj Hongkong-anoj elmigris alilanden, timante, ke granda tumulto okazos en Hongkong post kiam Ĉinio restarigos suverenecon super ĝi.” Post la naskiĝo de la politiko de “unu lando, du sistemoj”, la Hongkong-anoj trankviliĝis, kio garantiis la realiĝon de la glata reveno kaj stabila transiro de Hongkong.

Ĉu Ĉinio certe praktikos “unu lando, du sistemoj”, post kiam ĝi restarigos suverenecon super Hongkong? Kiel ĝi praktikos la politikon? Por respondi tiujn demandojn, aprile de 1985, la ĉina registaro sankciis la Ĉina-Britan Komunan Deklaracion pri Hongkong subskribitan de la ĉina kaj

brita registaroj, kaj per tio estis certigitaj la politikaj promesoj, kiaj “unu lando, du sistemoj” en Hongkong, “Hongkong sub regado de Hongkong-anoj”, “alta aŭtonomeco en Hongkong” kaj “la kapitalisma sistemo en Hongkong senŝanĝa dum 50 jaroj”. En 1990 la ĉina registaro publikigis la “Fundamenta Leĝo de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong de la Ĉina Popola Respubliko”, kiu definitivigas la politikon de “unu lando, du sistemoj” kiel unu el la fundamentaj ŝtataj politikoj de Ĉinio.

“Unu lando, du sistemoj” estas praktikata sub la premo, ke en Ĉinio estas nur unu Centra Popola Registaro, Hongkong estas speciala administra distrikto kun alta aŭtonomeco sub ĝi kaj patriotaj Hongkong-anoj estas ĉefaj administrantoj de Hongkong. La Centra Popola Registaro ne sendas ŝtatoficistojn al la registaro de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong nek intervenas en ĝiajn aferojn kadre de la aŭtonomeco.

Post kiam Ĉinio restarigos suverenecon super Hongkong, laŭ la “Fundamenta Leĝo de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong” Hongkong tenos plue siajn kapitalisman sistemon kaj propran vivmanieron, kaj Hongkong-anoj ĝuos liberojn kaj rajtojn politikan, ekonomian, socian kaj kulturan. Kaj kiel kutime la loĝantoj de la ĉeftero ne rajtos eniri Hongkong sen permeso.

LA UNUA ESTRO DE LA SPECIALA ADMINISTRA DISTRIKTO

De 1984, en kiu estis subskribita la Ĉina-Brita Komuna Deklaracio, ĝis 1997, kiam Ĉinio restarigos suverenecon super Hongkong,

MOJ” EN HONGKONG

la ĉina registaro kaj diversrondaj Hongkong-anoj multe laboris por praktiki la politikojn de “unu lando, du sistemoj” kaj “Hongkong sub regado de Hongkong-anoj”.

Januare de 1996 fondiĝis la Prepara Komitato de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong. Iom poste, ĝi starigis elektan komisionon konsistantan el 400 konstantaj Hongkong-anoj laŭ la politiko de “Hongkong sub regado de Hongkong-anoj”. Kiel Hongkong-ano, s-ro Tung Chee Hwa fariĝis la unua estro de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong post elektado publika, justa kaj racia inter tri kandidatoj. La Hongkong-anoj ekhavis sian unuan estron.

La 59-jara Tung Chee Hwa, kiu naskiĝis en Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco, ekvivis en Hongkong en aĝo de 12 jaroj. Li estas la unua filo de Tung Haoyun, ŝipmagnato de Hongkong. Tung Chee Hwa lernis en Britio, laboris en Usono, tamen li ĉiam estas konstanta Hongkong-ano. En sia kariero li dufoje spertis gravan repuŝon, tamen li ne regresis, sed revivigis sian entreprenon, dank’ al sia penado. El tio videblas, ke li estas firmvola, honesta kaj modesta. Krome, li estas ankaŭ pilkofanatikulo.

Kiel la unua estro de la Speci-

ala Administra Distrikto de Hongkong, s-ro Tung Chee Hwa nomumis 23 oficistojn de la unua registaro de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong, kion sankciis la Centra Popola Registaro. Krom du el ili, la aliaj 21 laboris en la antaŭa registaro de Hongkong. El ĉiuj ĝiaj gravaj oficistoj estis du neelektitaj. Unu estis alilandano, ĉar laŭ la “fundamenta leĝo”, nur ĉina civitano, kiu ne havas loĝrajton alilande, povas esti elektita kiel oficisto de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong, kaj la alia esprimis, ke li pretas emeritiĝi. Tiu aranĝo utilas al la stabileco de la ŝtatoficistaro kaj al la kontinueco de la registara funkciado, kio estas bonvena al 180 000 ŝtatoficistoj kaj diversaj rondoj de Hongkong.

Estis starigitaj ankaŭ provizora leĝdona konsilio, administra asembleo kaj aliaj organizoj de la Hongkong-a registaro. Ĉio tio montras la esencon de “Hongkong sub regado de Hongkong-anoj” kaj altan aŭtonomecon en Hongkong.


BELA PERSPEKTIVO

Elektite kiel la unua estro de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong, s-ro Tung Chee Hwa faris paroladon. Li diris: “Mi ne povus subtaksi la malfacilecon de la laboro estonta kaj defiojn alfrontotajn de mi, tamen mi havas

plenan fidon pri la perspektivo de Hongkong.”

En la lastaj kvin jaroj triono de la elmigrintoj, kiuj dubis pri la perspektivo, revenis en Hongkong. Antaŭe iuj antaŭdiris, ke granda kvanto da internacia kapitalo estos elprenita el Hongkong, sed fakte ĝi senĉese multiĝis intertempe. Laŭ statistiko, ĝis la fino de 1996 la nombro de alilandaj kompanioj, entreprenoj kaj bankoj, kiuj havis filion aŭ agentejon en Hongkong, atingis 4 523 kaj kreskis je 12% kompare kun tiu en 1995.

La rilatoj inter la ĉeftero kaj Hongkong pli kaj pli intimiĝos. Nun plejparto da fruktoj, legomoj kaj viando vendataj en Hongkong venas el la ĉeftero de Ĉinio kaj eĉ parto da kranakvo estas liverata de Guangdong-provinco. Aliflanke, ĉiujare Ĉinio enkondukas per Hongkong rimarkindan sumon da kapitalo el aliaj landoj. La komerca valoro de eksportaĵoj transigitaj per Hongkong konsistigas 40% de tiu de Ĉinio. El la supre dirita kredblas, ke post la reveno de Hongkong al la patrujo ĝi, kiel doganlibera distrikto kaj centro de internaciaj financo kaj komerco, alportos pli da ŝanĝoj kaj oportunoj al la ekonomia disvolvigo de Ĉinio. Samtempe la ĉeftero de Ĉinio, de kiu dependas la Hongkong-a ekonomio, liveros pli grandan merkaton al la disvolvigo de Hongkong. ■



Flago de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong



Emblemo de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong



Liu Xuefeng (meze) kaj la aŭtoro (maldekstre)

Li penas por lernado kaj vivtenado

de WANG JIANBING

De longa tempo multe da superflujaj laborfortoj de ĉinaj vilaĝoj sin turnas al urboj, precipe grandaj urboj, pro bezono de la ekonomia disvolviĝo kaj urba konstruado. Laŭ la plej nova statistiko, en la ĉinaj urboj estas 80 milionoj da homoj, kiuj ne estas fiksloĝantoj, inter kiuj 65 milionoj estas malpli-ol-35-jaraj. Mi prenu Pekinon kiel ekzemplon. Tie vivas 10 milionoj da loĝantoj kaj 3.295 milionoj da alilokanoj, kies 75% estas kamparanoj. En urboj ili per sia honesta laboro kontribuas al la urba ekonomia disvolviĝo kaj merkata prosperiĝo, kaj krome, ili lernas novajn teknikojn en la urboj kaj poste ludas pozitivan rolon por ekonomia disvolviĝo de sia hejmloko. Nun al vi mi rekomendas kamparan junulon Liu Xuefeng, kiu venis el landlima regiono kaj pene laboras en Pekino.

Suno

MIA SAMLOKANO EL NORDOKCIDENTO

Tiutage Liu venis al nia redakcio por kontribuo. Aŭskultante lian parolon, mi demandis pri lia hejmloko. "Mi venis el

Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono." Lia respondo ĝojigis min, ĉar ankaŭ mi estas Xinjiang-ano. Ni do ekparolis pri nia hejmloko.

Li, maldika kaj sunbruna, kun nigretaj postsignoj lasitaj de long-

tempa sablovento sur la vizaĝo, portis eksmodan veston. Sur lia vizaĝo mi facile legis pri lia malfacilo en la vivo. Liu diris, ke li venis al Pekino en 1992 kaj dum la 5 jaroj li neniam revenis hej-

men, ĉar nur la kosto por unudirekta vojaĝo egalas jaran enspezon de lia tuta familio. Li preferas sendi monon al siaj gepatroj.

Liu devenis de bela kaj malriĉa gubernio, mankas al ĝi akvo pro geografia situo. Norde de ĝi estas dezerto. En la lastaj jaroj la trosekeco kaŭzis seriozan malpliigon de la rikolto de tritiko, la tiea ĉefa agrikultura planto. Pro trafika malfacilo, la tie produktitaj pomoj ne povas transportiĝi aliloken kaj fariĝas nutraĵo de ŝafoj vintre. Malriĉeco multe turmentis lin. Vintre li multe suferis de malvarmo. Foje li estis skoldita de la patro, ĉar li "malŝparis" monon por ludiloj en la Printempa Festo. Vespere, hejme lin ĉiam akompanis kerosena lampo. Veninte de malgranda vilaĝo kun pli ol 600 loĝantoj al Pekino, li pli sentis ke la vilaĝo estas tro malproksima de moderna socio.

"Mi multe ĝojis en paŝtado de ŝafoj en vintraj ferioj. Sur la senlima Gobio estis nur mi kaj amaso da ŝafoj. Mi ĉiam havis radio-ricevilon ĉe mi. El radioelsendo mi multe lernis. Mi ŝatis rigardi orienten, kie la suno leviĝas, ĉar tie estas multaj urboj, kiujn mi ne vizitis." Evidente, li dronis en dolĉa rememoro.

LIA VIVO EN PEKINO

Poste mi bone konis Liu. En 1992 liaj gepatroj faris grandan klopodon kaj havigis al li kelkcent juanojn por ke li lernu en Pekino. Antaŭvespere de lia vojaĝo la patrino elprenis 100 juanojn (= 12 usonaj dolaroj) kaj donis al li. La monon ŝi akiris el vendo de ovoj. Kian ajn malfacilon li havis, li ne elspezis ĝin, ĉar li rigardas ĝin kiel amon de la patrino.

La lernopago por la unua lernojaro estis 1 600 juanoj. De la unua tago de la studenta registriĝo, li serĉis postlecian laboron en la lernejo. Li helpis manĝejon

selekti legomojn, bonordigis librojn en biblioteko. En vintro li gardis legomkelon de manĝejo, vespere li forŝiris putrajn foliojn de la brasikoj. En feriaj tagoj li lavis manĝilaron en restoracioj.

Tia vivo daŭris du jarojn. Li perlaboris monon por siaj lernopago kaj ĉiutaga vivo. Ĉiutage li elspezis nur du juanojn por manĝaĵoj.

En la unua jaro de lia studenta vivo li vizitis la Grandan Muron per trajno kun unu botelo da akvo kaj kvin mantoj (ordinara ĉina manĝaĵo, simila al pano). Tio estas lukso por li kaj tiutage li estis tre ĝoja.

LIA REVO PRI LA ESTONTECO

Diplomiĝinte en 1994, li volis labori en Pekino. Tamen li ne povis loĝi plu en la malmultekosta studenta pensio. Li ĉagreniĝis pri la loĝejo. Post nelonge li trovis laboron en iu lerneja gastejo: Tage li purigis ĉambrojn kaj necesejon, tiel ke li povis nokti tie senpage. Poste, vespere li laboris en iu kompanio kiel purigisto kaj nokte kiel portisto, tage li laboris en iu privata universitato.

Li zorgis aranĝis sian enspezon (700 juanoj). Li elspezis 180 juanojn por manĝaĵoj, 120 por libroj kaj veturado kaj aliajn 400 juanojn li deponis en banko. Li deponis monon ne nur por helpi la gepatrojn sed ankaŭ por plua studo. Liu ne kontentiĝas pri sia viv-

tenado, li havas sian revon.

"Mi volis studi agronomion en Pekino, sed bedaŭrinde mi studis financon kaj konton." Liu bone scias la malriĉecon de sia hejmloko. Kvankam li faras tute ordinaran laboron en Pekino kun la monata enspezo de 700 juanoj, tamen tio egalas al jara enspezo en la hejmloko! "Mi volontas esti pekinano, kaj mi deziregas ke miaj hejmlokanoj vivu bone," li diris.

Liu kaj laboras kaj studas. En la lasta julio li ekzamenite eniris en iun pekinan ĵurnalisman instituton. Li volas fariĝi studento-esploristo post 6 jaroj por ĵurnalisma fotografio. Li diris, ke li revenos hejmen kaj konigos la popolon per fotoj, ke en Ĉinio multaj malriĉaj lokoj, kia lia hejmloko, devas esti transformitaj kaj daŭre konstruataj. ■

HUMURAĴOJ

Kaprico

Edzino diris al edzo: "Ĉu vi ne diris antaŭ nia geedziĝo, ke mi estas diino en viaj okuloj?"

La edzo respondis: "Sed nun vi rimarkis, ke post nia geedziĝo mi jam fariĝis ateisto."

Surpriziĝo

Surstrate iu juna virino iris antaŭ iun pasanton kaj diris: "Pardonon, sinjoro, mi ĉiam observas vin, ĉar vi similas al unu el miaj infanoj."

"Kio?" la pasanto surpriziĝis. "Mi? Tute ne!" "Trankviliĝu, sinjoro, mi estas infanĝardenistino."

LA SEPA KONKURSO DE EPC-LEGADO FINITA

En la novembra numero de 1996 ni aperigis la demandaron por la sepa konkurso de EPC-legado. Dum tri monatoj de novembro 1996 ĝis januaro 1997 ni ricevis 101 respondojn el 24 landoj. La konkursantoj el Jugoslavio, Rumanio, Pollando, Rusio, Francio, Litovio, Brazilo kaj Italio estis kompare multaj.

Ke ni povis regule okazigi la konkurson, tion ni ŝuldas al la subteno de niaj legantoj. Multaj legantoj diris, ke plaĉas al ili tia konkurso. Vladimir Vyĉegjanin el Rusio skribis: "Relegante numerojn de la gazeto por respondi la demandojn mi denove eksciis multe da interesaj faktoj pri historio kaj kulturo de Ĉinio." S-ino Ada Cannata Tumminelli el Italio partoprenis ĉiujn 7 konkursojn. Ŝi diris, ke la konkurso devigis legantojn al la atenta relegado de ĉiuj numeroj kaj konigas kelkajn sciigojn, kiuj elŝteliĝis antaŭe. Aleksije Herić el Kroatio diris: "Laŭ mia opinio, ĉiu malnova leganto de EPC povus solvi tiun taskon dum kelkaj horoj, sed mi foliumante, por precize formuligi respondon, dum tri monatoj ĝuis trafante ion kion mi ne tra legis aŭ forgesis." Siniša Veličković, prezidanto de la Senta Esperanto-Societo de Jugoslavio, diris: "En nia societo estis granda intereso pri tiu konkurso kaj mi atendas ke multaj membroj sendos respondojn." Malgraŭ sia duonblindeco, Alexandra Verhova el Rusio atente tajpis la respondojn per skribomaŝino.

Doru Neagu el Rumanio rimarkigis nin pri la korekta nomo de Richthofen. Slawomir Szymala el Pollando sendis al ni longan leteron. Li opiniis, ke estos pli bone, se demandoj estos iomete aliaj, kaj la legantoj devos respondi per siaj vortoj. Ni trovas lian proponon akceptinda.

Estis la jarŝanĝo, preskaŭ ĉiuj konkursantoj adresis al ni novjarajn salutojn kaj bondezirojn. Iuj el ili sendis al ni belajn salutkartojn kaj poŝtmarkojn, kiuj multe varmigis nian koron. Ĉiokaze en la nomo de la redakcio mi esprimas al tiuj legantoj koran dankon kaj deziras al ili san-

on, feliĉon kaj sukceson en laboro!

Inter la 101 konkursantoj 74 ĝuste respondis ĉiujn demandojn. Post la lotumo ni anoncas, ke la unuagradan premion gajnis l'Lona Horvat el Jugoslavio kaj Nicole kaj Pierre Hardy el Francio. Ili ricevis po unu klotonean flolvazon. La duagradan premion gajnis Sanela Zakić, Mikola Ramanoŭski, Doru Neagu, Madeleine Tourtois, Carlos Prates Castanho, Karine Arakeljan, Marta L. kaj Magda D., Jindřich Tomišek, Halina Jurska-Berezowska, Nzilamosi Mayombe. Ili ricevis po unu esperantigitan klasikan novelaron "Mirrakontoj de Liaozhai". La triagradan premion gajnis Margareta Aranyosi, Guo Lujun, Mandita Iacob, Magdolna Juhász, Denise A. Deslandes, Aleksije Herić, Radulaski Dusan, P.N. Ĉmeljov, Ly Kittus, Ana M^a Molera, Eliana Sessegolo, Jürgen Berndt, Edouard Schertzer, Suzanna Barabas, Milan Marković, N. Ŝadjko, Victor Sluczewski, Godart marcel, J. Ŝimkonis, Juozas Raciun. Ili ricevis po unu Esperantan libron "Ĉina Enciklopedieto". Al iuj gajnintoj ni sendis, anstataŭ la supre menciitaj libroj, ĉinajn poŝtmarkojn, revuon EPC de 1997 aŭ ion alian laŭ ilia deziro. Ni sendis memoraĵon al ĉiuj ceteraj, kiuj ĝuste respondis la demandojn, tamen ne gajnis premion.

La ĝustaj solvoj estas jene (ciferoj en parentezo markas numeron kaj paĝon, en kiu troveblas la ĝusta solvo): 1. "Azio kaj la 21-a jarcento" (4-43); 2. W. Richthofen (1-29); 3. Xinjiang (2-16); 4. la Akademio de Esperanto (10-6); 5. "Pilgrimado al Okcidento" (4-29); 6. 25 (10-45); 7. Huangdi, Yandi, Chiyu (3-20); 8. Ĉinio (9-48); 9. Laŭlum, Seimin (aŭ Xie Yuming) (8-44, 10-24); 10. pulvon (11-48). El la respondoj ni vidas, ke iuj konkursantoj eraris ĉefe en la tria, ĉar ili skribis "Tianshan-montaron" anstataŭ "Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono".

Ni daŭre organizos konkurson de EPC-legado. La demandaron por la oka konkurso ni aperigos en la novembra numero de 1997. Ni esperas ke pli da legantoj partoprenos la konkurson kaj donos al ni konsilojn kaj proponojn.



La bronza statuo de Hujucz

S-ano Hujucz (1896-1986) estis pioniro de la ĉina E-movado, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, elstara ĵurnalisto kaj eldonisto kaj grava kontribuinto al la nuntempa ĉina kulturo. Lia bronza statuo

inaŭguriĝis en lia hejmurbo Shangyu, Zhejiang-provinco, septembre de 1996 okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo.

Bronza statuo de Hujucz

Anoncoj varbataj

“El Popola Ĉinio” naskiĝis en 1950. Depost la naskiĝo ĝi konigas Ĉinion kaj la ĉinan kaj alilandan E-movadojn kaj per tio akcelas la interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj. Ĝi distribuiĝas al 157 landoj kaj regionoj kaj servas kiel ligilo de amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Por bone disvolvi la rolon de Esperanto en la kampoj ekonomia, scienca kaj kultura la redakcio fondis Reklaman Fakon en 1995.

Ni kore invitas vin varbi ekstermovadajn anoncojn kaj fari viajn anoncojn en EPC. Varbintoj de ekstermovadaj anoncoj

ricevas 20%-an makleraĵon. Detalaj informoj haveblas ĉe: **Redakcio de El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio.**

Telefono: + 86-10-68321808

Fakso: + 86-10-68321808


TARIFO

	USD
Dorskovrilpaĝo	2 000
Reverso de dorskovrilpaĝo	1 500
Interna paĝo (kolora)	1 000
Interna paĝo (nigra-blanka)	500

*50%-prezo por duonpaĝo. Por movadaj anoncoj validas duona prezo.

YU TAO:

Interparolo kun Istvan Ertl pri E-gazetoj



S-ro Istvan Ertl

Yu Tao: Antaŭ du jaroj vi intervjuis min ĉi tie, kaj en Koreio mia koleginino Yin Qin intervjuis vin. Nun venas mia vico. En la pasintaj du jaroj via vivo iom ŝanĝiĝis, vi ne nur estas edzo sed ankaŭ patro...

Istvan: De unu jaro mi havas komputilon hejme, kaj nun estas sklavo de nia revuo kaj oficejo kaj hejme. Tamen mi profitas la tempon hejme por ludi kun mia filino kaj instrui ŝin — kio fakte estas sama afero.

Yu Tao: Mi volas paroli kun vi

pri kelkaj temoj rilate al E-gazetoj. Ĉu en kelkaj humuraj bildklarigoj de Esperanto vi montras vian stilon? Vi ja vortoludas ankaŭ dum la kafaŭzo...

Istvan: Se temas pri la tono de bildklarigoj, mi kredas, ke nur foje ili estas humuraj, tio verŝajne venas el mia emo — la revuo estas pli serioza ol mi mem, mi devas serĉi iun eblon por esprimi mian humuron. Sed almenaŭ vi povas kredi ĉion skribitan en la klarigoj, male oni ne povus difini kio estas vero kaj kio estas ŝerco. Mi kredas, ke

mi faras tion pli bone ol EPĈ, en kiu foje aperas klarigoj kiel “Kampano en laborado”...

Yu Tao: Jes, foje tio okazas. Verŝajne EPĈ devas havi iom pli da humureco anstataŭ tro da seriozeco.

Istvan: Sed mi certe interŝanĝus la kvaliton de bildoj de EPĈ kontraŭ miaj bildklarigoj!

Yu Tao: Kian rolon ludas la grafiko en la revuo?

Istvan: Pri tio mi tute ne estas kontenta, bedaŭrinde mi mem ne

havas vere artisman senton, kvankam mi eble iomete sukcese evoluis tiukampe. Mi laboras en sama ĉambro kun Franĉjo, redaktoro de "Kontakto", kiu havas tian talenton. Sed li estas tiel okupita, mi do ne volas ŝarĝi lin, nur malofte petas konsilon de li. Nuntempe la revuo oficiala kaj serioza kiel "Esperanto" ankaŭ devas aspekti pli varie, ĉar legantoj kutimas al tio en ĉiutaga vivo. Nun la revuo fariĝis pli bon-aspekta dank' al helpo de Franĉjo kaj aliaj. Kiam en 1994 ni decidis refasoni la revuon, tio daŭris tutan semajnon, Franĉjo faris multajn projektojn, elektis liter-tipojn, elpensis la titolojn, demandis ĉies opiniojn, montris almenaŭ kvin variantojn, li multege laboris.

Yu Tao: Kiel vi korespondas kun legantoj?

Istvan: Ĉiutage venas average 6 leteroj, inkluzive retpoŝtajn. Mi bedaŭrinde ne havas tempon respondi al ĉiuj. Tamen mi ĉiam interkonsentas kun la aŭtoroj de gravaj artikoloj pri ŝanĝoj kaj, ofte, mallongigoj de iliaj kontribuajoj, mi ne volas fari tion sen demando la koncernaton. Mi ankaŭ skribas al homoj por peti de ili kontribuon kutime pri evento.

Yu Tao: Ĉu vi rifuzis foje artikolon de gravuloj, ekz. prezidanto de UEA?

Istvan: Jes, mi prijuĝas la aferon ĉu publikiginda aŭ ne, neniun havas pli grandan privilegion pro tio ke li estas gravulo, gravas la ideo. Principe la redaktoro estas tute libera decidi pri la enhavo de la revuo, kaj tio estas tre grava laŭ mi. Nur se ekzistas decido de la komitato aŭ estraro de UEA pri nepublikigo de io, tion mi devas obei.

Yu Tao: Kiun rubrikon vi pli ŝatas?

Istvan: Kiel leganto mi ĉiam ŝatas "recenzo" kaj "laste aperis", ĉar mi ŝatas literaturon. Mi kreis la rubrikon "forumo" por longaj opini-artikoloj. Tio ne signifas ke ne ekzistis io tia, antaŭe simple mankis al ĝi la nomo. Mi ankaŭ

havis serion "la diligenta kolegaro" pri aliaj revuoj. Inter ili troviĝis ankaŭ EPĈ, sed bedaŭrinde mi ne sukcesis daŭrigi ĝin. Nuntempe maloftas ankaŭ ŝerca angulo, kiun mi baptis "Str-angulo".

Yu Tao: Vi ankaŭ verkas, tradukas kaj prelegas...

Istvan: Ne ofte nun. Ĉar mankas al mi tempo kaj iomete da emo, se oni dum la tuta tago esperantumas, do en alia tempo ne plu emas tion fari. Mi efektive faras libertempe tradukon al la hungara. Mi ŝatas verki.

Yu Tao: Kian kapablon la redaktoro aŭ ĉefredaktoro de revuo devas havi?

Istvan: La plej grava estas renovigemo, ŝanĝemo. Mi verŝajne ne havas tion sufiĉe. Redaktoro ĉiam havu inventemon aŭ ideon, ke en la sekva numero la leganto trovu ion neatenditan, kaj nova temo kaptu la atenton. Mi ofte pensas ke la legantoj ricevis la revuon kaj vidis, ke jen "laste aperis" estas en la sama loko, "loke" "fake" ankaŭ. Preskaŭ duono de la revuo ne donis grandan surprizon. Mi ŝatus, ke almenaŭ la ĉefa artikolo estu iel surpriza. Ekzemple mi fieras, ke en la maja numero de 1995 mi trafis ĉefan temon pri Valdemar Langlet, sveda pionira e-isto, kiu savis milojn da persekutitoj dum la Dua Mondmilito kiel la fama germano Schindler en la fama filmo. Mi sukcesis levi ion malmulte konatan kaj igi ĝin vaste konata. Bedaŭrinde tio ne ofte okazas.

Yu Tao: Kiel allogi junajn legantojn?

Istvan: Ĉu enhavo, ĉu formo, eble ni komencu per la formo, ĉar nun homoj pli kaj pli postulas, ke revuo estu bele farita, kaj ĝuste la junuloj estas tre atentemaj pri tio. Rilate la temojn, mi kredas ke baze la intereso de e-istoj ĉu junaj aŭ nejunaj estas sufiĉe similaj. Kaj enhavo dependas de tio, pri kiu revuo temas, ekz. en la revuo "Esperanto" mi preskaŭ neniam povas meti grandan artikolon pri rokmuziko, krom se temas pri rokmuziko

en Esperanto. Sed al ekzemple EPĈ mi certe rekomendus artikolon pri rokmuziko en Ĉinio.

Yu Tao: Ĉu la revuo "Esperanto" iam iros en interreton?

Istvan: Verŝajne eĉ neeviteble. En kelkaj jaroj, ĉiu deca revuo devos havi varianton en interreto. Mi esperas, ke tre baldaŭ ni sukcesos fari ion. La demando estas kion oni povas meti en la reton, ĉar ideala ret-varianto devas doni ion alian ol la papera kaj anstataŭ forpreni abonantojn de la papera varianto ĝi devas ĝuste allogi.

Yu Tao: Iu via antaŭulo diris: "Redakti ĉi tiun revuon estas la plej respondeca kaj la plej peza laboro en la Esperanto-movado..."

Istvan: Mi eble estas unu el la plej pezaj laborantoj (preskaŭ 90 kilogramojn), sed mia laboro estas pli tempo-postula ol peza. Respondeca certe ĝi estas. "Esperanto" estas la plej granda kaj legata revuo en Esperantujo. Ĉe ĉiu frazo, kiun mi skribas kaj redaktas, mi devas serioze pripensi kaj pripesi. Tamen mi opinias, ke eble la ĝenerala direktoro de UEA estas pli respondeca, ne indas serĉi kiu estas la plej, sufiĉas diri, ke redakti la revuon "Esperanto" estas tre respondeca tasko.

Yu Tao: Se vi devas verki biografion, kion vi prezentos?

Istvan: Mi trovis hejme, kiam mi estis 12-jara, iun hungarlingvan "Gramatiko de Esperanto" kaj foliumis ĝin, kvankam ĝi ne estis lernolibro, tamen mi sufiĉe bone lernis el ĝi. 15-jara, mi ekzamenigis. Post mia unua studjaro en universitato mi vojaĝis al okcidentaj landoj per Pasporta Servo, ĉie oni tre bone akceptis min, tio estis bonvenigo al Esperantujo. Mi diplomigis pri Esperanto, latino kaj la franca lingvo en la universitato ELTE de Budapeŝto en 1989. Poste mi instruis kaj samtempe laboris por radio kaj eldonejo. Mi redaktis "Internacian Pedagogian Revuon" kaj "Kontakton". En 1992 mi komencis labori ĉe UEA.



La aŭtoro

Poemoj

de **ŠTEFANIA FLEGAR***

(Kroatio)

Strato de mia sonĝo

*Ho strato mallarĝa kaj malhela
En ĝi ĉiam nokto daŭras
Tiel ĉarma kaj tiel bela
Kiel rivereto kiu murmuras.*

*Ĉiam en ĝi estas plenumo
Kaj oni multe negocadas
Trove iun estas senpove
Ĉar multthomoj promenadas.*

*Ĝi sterniĝas zigzagante
Kaj pompe ĝi post pluvo brilas
Mi tre timas rigardante
Kiel ĝi al serpento similas.*

*Pro tio mi urĝas kaj kuras
Kaptis min tre granda timo
Ĉar tio jam longe daŭras
Kaj tremas en mi tuta animo.*

*Sed kiam mi vekigis
Premis min io en mia gorĝo
Kaj tiam mi sciigis
Ke tio estis nur malbona sonĝo.*

Aĝa kverko

*Ĝi firme kaj fiere staras en arbaro
Etendante siajn piedojn for de sia korpo
Kiam ĝi ricevos la foliaron
Ĝi fariĝos tre valora arbo.*

*Larĝeco de ĝiaj fortaj manoj
Kiuj faras abundan ombbron
Kaj tio konvenas por nia sano*

*Nur se oni ne aŭdas la tondron.
Sur ĝiaj branĉoj kuŝas ripozantoj
Kies sekretojn ĝi konservas
Eĉ se ili estas amantoj
Ĵus tiam dika ombro bonvenas.
Kirloventoj kaj nigraj nuboj
Precipe aĝan kverkon ĝi celas
Aĝulo kaj malfeliĉulo sen duboj
Ankoraŭ kiam la sago aperas.
Ĝi vivas kaj kreskas pli ol cent jarojn
Pro sia gento ĝi posedas tiom da forteco
Longa vivo enhavas ankaŭ la barojn
Vintro turmentas ĝin pro malvarmeco.
Homoj alte taksas ĝian valoron
Aparte dum ĝi estas arbo
Aŭtune kaptas ĝin doloro
Pro timo ke ĝi ne estos karbo.
La tempo pasadas ĝi longe vivis
Jaroj detruadas al ĝi ĝian dignon
Kaj segistoj forsegi ĝin decidis
Aĝa kverko fariĝos brul' kaj konstru' ligno.*

La trajno en la krepusko

*Mi rigardis kiel sunsubiras
La krepusko jam kovris la teron
Kampe sin unu besto tiras
Kaj ĝia vojo estas de la fero.
Kiu estas tiu besto nigra
Kiu bruegas trans la kampoj
Kun multnombraj piedoj senfingraj
Kaj sur kapo du grandaj lampoj.
Kial ĝi urĝas, bruas, blovas kaj ĝemas
Eĉ ekfajfas ĉe l' tunelo*

Mia franca amiko

de MARIA STATKIEWICZ (Pollando)

MI estas polino. Mi esperantistiĝis antaŭ ok jaroj. Foje en 1992 mi trovis en gazeto la adreson de franca esperantisto Guy Tatet. Li estis arbaristo. Post emeritiĝo li loĝas en malgranda vilaĝo proksime al urbo Vichy. Komenciĝis inter ni interesa korespondado, kiu daŭris ĝis nun.

Somere de 1994 Guy invitis min al sia domo en Francio. Mi veturis per trajno kaj dank' al helpo de kunvojaĝantoj mi atingis lian loĝlokon. Li loĝis kune kun siaj edzino kaj filo. Liaj familianoj bedaŭrinde ne konis Esperanton. Li fariĝis interpretanto. En lia domo troviĝis granda hundo kaj kelkaj katoj. Tio estis komprenebla, ĉar li estis arbaristo kaj forte kunligita kun la naturo.

Ĉiumatene ni promenadis en proksima arbareto kune kun la hundo Stop. Survoje ni diskutis pri diversaj aferoj. Mi ĝojis, ke estas plenumita mia revo, ke mi povas uzi la internacian lingvon por kompreni alian homon. Ni eĉ diskutis pri filmoj. Tiam mi ekvidis, ke Esperanto vivas, kaj ke ĝi ludas gravan rolon en interhoma kompreniĝo. Kiel mi estis dankema al Zamenhof pro lia grandioza donaco al la homaro.

Daŭris varmego malbona por ekskursoj. Malgraŭ tio, ni vizitis la urbon Channile, kie troviĝas

malnovaj monaĥejo kaj kastelo. Ni admiris la pitoreskan valon Sioule. Ĝia nomo devenas de la rivero Sioule. Sur la altaj deklivoj oni povas vidi la imponajn verdaĵojn kaj altegajn rokojn. Ofte la deklivoj estis kovritaj de violaj erikoj. Ĉio feaje aspektis. Poste ni vizitis montaran preĝejon en Châtel Montagne. En la preĝejo troviĝis memoro-libro. Mi enskribis miajn impresojn en tiun libron Esperante.

Reveninte de la ekskursoj mi legis multajn interesajn librojn, ĉar Guy havis riĉan bibliotekon kun Esperantaj libroj. De kelkaj jaroj li abonas la revuon "El Popola Ĉinio". Li diris, ke ĝi estas la plej ŝatata gazeto. La familio de Guy estis gastama. Ĉiam sur la manĝotablo aperadis multaj bongustaj manĝaĵoj, kiujn bone preparis la edzino de mia amiko Claudine.

Ĉio havas la finon. Ĝojplene mi revenis hejmen. Nun restas al mi nur sopiro kaj memoro pri tiu neforgesebla tempo. ■



*Eble ĉi tie pri rapideco temas
Kaj vento demetis al ĝi la ĉapelon
Ho fera besto nigre-kolorita
Konsistinta el multaj ŝraŭboj
Ĉiam ĝi preta sur vojo senfinita
Ĝin ĝenas nek nigraj nuboj.
Akre ĝiaj okuloj brilas
Pene ĝi spiradas laŭ deklivo
Pro siaj membroj al tenio similas
Tamen tio estas la lokomotivo.
Mi rekonis la trajnon en tiu besto
Kaj miajn longvojaĝojn ekmemoris
Rigardante nur ĝian foreston*

*Mi sentis kortremon kaj mi ekploris.
Ĉu mi vere ne plu vojaĝos
Per la plej sekura veturilo
Aŭ mi nur tion imagos
Ĉar nun mi uzas nur la skribilon.
Ŝatata mia trajno estu salutata
Survoje mi deziras al ĝi la prosperon
Pro sia tiro ĝi estas enviata
Sed al mi restas nur la espero.*

*Antaŭ emeritiĝo ŝi laboris en direktejo de la fervojo, kiu ebligis al ŝi senpagajn vojaĝojn, tiel ŝi havis malantaŭ si ĉirkaŭ dudek IFEF-kongresojn. Pensiĝinte, ŝi verkis poemojn Esperantajn.

ĈINIO

● La 9-an de marto kelkaj e-istoj de Ŝanhajo renkontiĝis en la hejmo de gesinjoroj Hadie Macleod, kiuj venis el Aŭstralio por instrui la anglan lingvon en Ĉinio. Dum la renkontiĝo ili ŝercis en Esperanto, aŭskultis Esperantomuzikon, rigardis Esperanto-videobendon el Pollando kaj prezentis akrobataĵojn. Tiuj e-istoj regule renkontiĝas. La 23-an ili piknikis en la Ŝanhaja Botanika Ĝardeno. (Ji Yingeng)



E-kursanoj de la Tonghua-a Normala Instituto

● En la lastaj dek jaroj la Tonghua-a Normala Instituto de Jilin-provinco funkciigis E-kursojn kaj instruis Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. Ekde septembro 1996 la studentoj de ĝia fremdlingva fakultato rajtas elekti Esperanton kiel la duan fremdan lingvon. La unuan E-kurson ĉeestas 9 studentoj.

(Cheng Guanying)

● La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis en la 1-a de januaro 1997 la poŝtmarkoseriojn "La Ĉina Turisma Jaro" kaj "La Ĉina Unua Ĝenerala Esploro de Agrikulturo", kaj en la 5-a de januaro la poŝtmarkoserion "La Bova Jaro". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisiaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui. (Zhang Linrui)

BRAZILIO

● Tiu, kiu povas kaj volas skribi du-, tri- aŭ kvar-paĝan artikolon pri la temo "Kial mi estas esperantisto" aŭ "Miaj travivaĵoj en Esperantio", por ke ĝi estu ero de artikolara libro, kies aŭtoroj estos e-istoj el ĉirkaŭ kvardek landoj, bonvolu skribi al Pekim Vaz, Caixa Postal, 182, Belem-pa, BR-66017-970, Brazilo. Poste li tradukos la libron en la lingvon portugalan kun la celo diskonigi Esperanton. (Pekim Vaz)

HUNGARIO

● La 26-a Internacia Renkonto Naturamika (IREN) okazos de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1997 en la vilaĝa ripozloko Abaliget en la montaro Mecsek (Meĉek), 18 km-ojn distanco de la dumiljara urbo Pecs (Peĉ). La partoprenantoj loĝos en malgranda arbora kampadejo. Riĉa, malstreĉa programo kun amika etoso atendas vin tie: gimnastiko, naĝado, migrado surmonte, engrote; baza kaj konversacia kursoj de Esperanto; amuzaj vesperoj: tendarfajro, lampiona boatado surlage; dancado, maskobalo; librofoiro, borso de alportitaj esperantaĵoj ktp. Pli detalajn informojn vi povas ricevi aŭ letere, aŭ telefone: 36-72-333123 de s-ino Mathe, Nelli, aŭ 36-72-253751 de s-ro Szucs, Stefano (vespere). Bonvolu sendi aliĝilojn al koresponda adreso: Esperanto Asocio, H-7601 Pecs, Pf-98. (Esperanto Asocio en Baranja)

KOREIO

● Inter la 21-a kaj la 23-a de februaro 1997 okazis '97 Vintra Tutlanda Kunloĝado de KEA en la Yusong-a Junulara Gastejo en la urbo Taejon. Partoprenis 69 personoj, inkluzive du nekoreojn. Ĉi-foje okulfrapis du punktoj. Unu estas, ke la Organiza Komitato konsistanta el 7 junuloj preparis la tuton, kaj geedzoj Maro kaj Salo rezervis kelkajn kurso-indikilojn kun amindaj desegnaĵoj, kiujn oni povas vidi en la memoriga karto de la 50-a IJK. La alia estas, ke la komitatanoj uzis la radio-aparatojn, kiuj donis tre multe da helpo por faciligi komunikadon kaj kontroladon inter la kursoĉambroj.

La kunloĝadejo estas ĉirkaŭita de tre bela pejzaĝo, tial ĉiumatene oni spiris freŝan aeron. Kaj decidiĝis, ke tie okazu '97 Somera Tutlanda Kunloĝado de la 4-a ĝis la 6-a de julio kaj la 16-a Komuna Seminario de Esperanto inter Korea, Ĉina kaj Japana Junularoj de la 15-a ĝis la 17-a de aŭgusto. (Kim Kiwon)

Moralo kaj amuzo per muzo

GERMANAJ KLASIKAJ NOVELOJ tradukitaj de Reinhard Haupenthal el la germana. **ILTIS-ELDONEJO**. Formato: 14.5 cm × 20.5 cm. 118 p. Prezo ne montrita.


El la kolekto de tri klasikaj noveloj, la unua el la plumo de Friedrich von Schiller, titolita per **LA KRIMULO PRO HONORO PERDITA**, kaj la tria el la plumo de Annette von Droste-Hulshoff, titolita per **LA FAGO DE LA JUDOJ**, apartenas al la krimrakontoj.

La protagonisto de la unua rakonto Christian Wolf, filo de urbeto restoraciestro, estis malbela mokobjekto, sed li klopodis plaĉi al knabino Jana per lukro ĉasŝtela. Lia rivalo ĉasknabo Roberto malkovris lin en krimaktivado kaj lin puŝis en mizeron de monopuno, perdo de liaj malmultaj posedaĵoj kaj trijara punlaboro kun brulstampita galgosigno sur la dorso, en fortreso, kie li fariĝis disĉiplo de kanajloj kaj ilin superis iasence. Post sia liberigo, li murdis Roberton kun vengemo kaj fariĝis ĉefo de banditoj. Konfliktoj en la diabla bando fine pelis lin al decido ĝin forlasi kaj peti pardonon de la princo kaj lian permeson servi al la moŝto, sed li ne ricevis la deziratan respondon. Li decidis fuĝi el la lando, sed estis kaptita ĉe la landlimo kaj finis sian karieron per kapitulaco.

La ĉefheroo de **LA FAGO DE LA JUDOJ** Frederiko, filo de duonfarmisto en montvilaĝo pitoreska, adoptiĝis al sia vidva onklo, kiu partoprenis aktivadon de lignoŝtelistoj. La onklo mortigis

patrolantan forstiston Brandis per sia adzo, kiun oni trovis kiel ateston de la murdinto. Frederiko rekonis la adzon, sed neis pri la vero. Poste, okazis alia murdo al juda riĉulo, pri kio Frederiko estis suspektata. Li forfuĝis el la hejmloko al Turkujo kune kun orfo Johano servanta al lia onklo, sed krimulo Moseo Ĉifonulo konfesis, ke li mem murdis la judon. La rakonto finiĝis per reveno de Johano al sia hejmloko kaj lia sinpendigo ĉe la fago de la judoj.

La *Novelo* de Johann Wolfgang von Goethe prezentas al ni tute alian specon de rakonto pri tago de la vivo de princedzino, kiu faris rajdan ekskurson akompanate de sia eskviro kaj onklo de la edzo. Unue ili malrapide rajdis tra bazaro ĉe la montpiedo kaj poste supren al antikva burgo ruiniĝinta, kaj ĝuis panoramon de la montaro kun sennombraj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo. Dum sia ĝuo de la paca naturo, la princino diris: "Ne por la unua fojo mi konstatas en la alta loko panorama, kiel puras kaj pacas la klara naturo, impresas, kvazaŭ nenio hida troviĝus en la mondo. Poste, ĉe la reveno al homa loĝloko, ĉu alta aŭ basa, vasta aŭ strikta, ĉiam troviĝas kaŭzo por batalo, disputo, arbitracio aŭ reguligo." Tiam la eskviro rimarkis fajron en la bazaro. Ilin atingis tigro fuĝinta el la cirko. Por savi la princedzinon, la eskviro pafmortigis la beston. Jen alkuris la mastrino de la cirko kaj ĉagreniĝis pro viktimiĝo de la domestikita tigro. Fuĝis efektive ankaŭ la leono. La posedantoj petis ke la nobeloj ne mor-



GERMANAJ
KLASIKAJ NOVELOJ

tigu la sendanĝeran beston kaj promesis reenkaŝigi la leonon per flutmuziko kaj kantoj. La priskriboj pri la preparo de ĉaso, la ruino de antikva burgo, la pitoreskaj belaĵoj de la naturo montregiona kaj la aktivadoj en la novelo prezentas al ni bildojn de harmonio kaj amo de paco.

Vantemo, fiero kaj socia maljusto kaŭzas krimojn, do eliminindas. Amo al paco kaj harmonio alportas feliĉon, do prikantindas. La tri noveloj ne nur nin ĝuigas per estetiko beletra, sed ankaŭ meditigas morale. Kaj ŝatantoj de detektivaj rakontoj kredeble interesiĝos precipe pri tiuj de Schiller kaj Droste-Hulshoff.

Mi kredas, ke multaj el la legantoj dankos akademianon R. Haupenthal pro lia nova kontribuo al nia tradukita beletro per sia sperta kaj lerta plumo. Tamen, se mi devas diri kelkajn vortojn pri la lingvaĵoj de la traduko, mi volas rimarkigi, ke mankas necesaj klarigoj pri multaj el la uzitaj neologismoj netroveblaj eĉ en la Plena Ilustrita Vortaro, kiun ne posedas multaj legemuloj. La vivo de la neologismoj ja dependas ne nur de la proponantoj, sed ankaŭ de la legantoj. Ĉu la neologismoj povus esti akceptataj kaj vaste uzataj, se oni eĉ ne povus ilin kompreni sen klopodo?

Recenzis **Laŭlum**

Por loĝigi en novaj domoj

de JI PING

LA pasintan printempon Li Yuping, emeritino de pekina tekstila fabriko, kaj siaj 4 familianoj transloĝiĝis el malpli-ol-20-kvadratmetra domo, kie ili loĝis dum dekoj da jaroj, en novan apartamenton el 2 ĉambroj.

En la ĉinaj urboj estas 5.5 milionoj da familioj, kiuj havas loĝejon malgrandan, kiel la malnova domo de Li Yuping.

Por solvi malfacilon de tiuj urboj en loĝado la ĉina registaro alprenis jenan rimedon, t.e., la registaro asignas sumon da mono por konstrui loĝdomojn. Poste oni vendas ilin per ties konstrua prezo kaj uzas la reprenitan monsumon por plua domkonstruado. La loĝdomoj estas konstruitaj por urboj, kiuj ne havas fiksan loĝejon aŭ loĝas en domoj kadukaj aŭ tre malgrandaj. Inter ili

emeritoj kaj instruistoj ĝuas privilegion ilin aĉeti. Ĝis la fino de 1996 Ĉinio finkonstruis tiajn loĝdomojn kun plankareo de 20 milionoj da kvadrataj metroj. Ĉiujare en la venonta tempo 240 000 familioj transloĝiĝos en novajn domojn.

Tiaj loĝdomoj estas ŝatataj pro siaj simpla kaj racia strukturo kaj bona kvalito. Kompreneble, multaj urboj kun malalta enspezo ne kapablas aĉeti tian loĝdomon, kvankam ĝi estas multe malpli kara ol alispecaj loĝdomoj. Pro tio la ŝtato praktikos paŝo post paŝo novan sistemon por individuoj-aĉetantoj, kiuj devas pagi unue almenaŭ 40% de la aĉetprezo kaj amortizi la alian parton en 10 jaroj. Krome, la ŝtato alprenos aliajn rimedojn por helpi tiujn, kiuj havas malfacilon por aĉeti loĝdomon.

Utiligo de nuklea energio

de HE SHAN

FAVORANTE la homaron, nuklea energio ĝin ankaŭ minacas. Do, kiel utiligi nuklean energion en sekureco fariĝis problemo komuna por la landoj, inkl. de Ĉinio, kiuj posedas nuklean elektrejon. Depost sia ekfunkciado en decembro 1991 la Qinshan(Ĉinŝan)-a Nuklea Elektrejo en orienta Ĉinio donas ĉiujare 1.5 miliardojn da kWh da elektro. Dank' al tio, Ĉinio ne nur plibonigis sian energian situacion, sed ankaŭ fariĝis la 7-a lando, kiu kapablas mem projekti, konstrui kaj administri nuklean elektrejon.

S-ro Ouyang Yu, ĉefprojektinto de la Qinshan-a Nuklea Elektrejo, diris al mi, ke nuklea elektrejo donas multe da bonoj, tamen, se okazas akcidento en ĝi, tio do estos terura katastrofo kaj eĉ minacos aliajn landojn. Pro tio, konstruado de nuklea elektrejo estas tre atentata de diverslandaj popoloj. Por garantii la sekurecon de nuklea elektrejo Ĉinio faris grandan penadon,

ekz., en la elektrejo sekuriga reaktoro de akva premo anstataŭas grafitan reaktoron kutime uzatan. Ĝi tute ne amasigas siajn solidajn forĵetaĵojn en la medio. Post traktado ĝia ellasita gaso eligas malpli da radioaktivaj substancoj ol tiuj de karboenergia elektrejo. Krome, ĝi, kun perfekta observa sistemo, havas radioaktivajn sondilojn en la vasta spaco ĉirkaŭ si, dank' al kiuj oni povas rimarki radiadon de la elektrejo antaŭ ol eniri ĝin.

Nun Ĉinio helpas al Pakistano konstrui nuklean elektrejon, kio estas sankciita de la Internacia Atomenergia Agentejo.

Ĉinio planis disvolvi en la venontaj 5 jaroj la Qinshan-an, la 2-an Guangdong-an kaj Liaoning-an Nukleajn Elektrejojn kun la totala generatora kapacito de 6.8 milionoj da kW. En la venonta jarcento Ĉinio progresigos plue utiligon de nuklea energio en sukceso.

Kurantaj aferoj

● Por partopreni kaj akceli la ekonomian kaj komercan kunlaboron de la Azia-Pacifika Ekonomia Kooperativo (APEC), junio de 1997 Ĉinio unuafoje gastigis la 2-an Internacian Komercean Foiiron de APEC en Yantai, Shandong-provinco, kun jena programo: negoco de komercaĵoj, importo de investoj, ekspedo de laboruloj eksterlanden, informo pri turismaj aferoj, arta prezento ktp.

● La nombro de malriĉaj kamparanoj de Ĉinio reduktiĝis de 250 milionoj en 1978, kiam en Ĉinio ekpraktikiĝis la politiko de reformado kaj pordomalfermo, al 56 milionoj nun. En la 70-aj jaroj la malriĉaj popolanoj de Ĉinio konsistigis 1/4 de tiuj de la mondo, sed nun — 1/20. Ĉinio penas forigi malriĉecon ĉe la fino de la kuranta jarcento.

● En 1996 la totala grena produktokvanto de la ŝtataj kultivejoj superis 15 milionojn da tunoj, 21% pli multe ol tiu en 1995. La totala produktokvanto de kotono atingis 538 200 tunojn. Kaj la produktokvanto de sukero, viando, bovina lakto, akvoproduktaĵoj k.a. kreskis stabile.

● La provincoj Shaanxi (Ŝenŝji), Gansu kaj Qinghai kaj la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio finkonstruis la Lijiaxia-(Liĝjaŝja)-an Hidroelektrejon, la plej avangardan kaj plej grandan sur la Flava Rivero. Ĝi posedas 5 generatorarojn kun la totala generatora kapacito de 2 milionoj da kW.

● Tibeto havas unu scienc-

esploran instituton, 59 organizojn por disvastigi agrikulturajn teknikojn, 20 altlernejojn kaj teknikajn kolegiojn kaj 13 000 fakulojn de naturaj sciencoj, el kiuj pli ol 60% estas tibetanoj kaj aliaj nacimallimultanoj.

● La dezerto sudokcidente de la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero abundas je soda sulfato, materialo de la industrioj kemia, vitra kaj

papera. En 1986 sciencistoj kaj teknikistoj de la Yumen-a Kemi-industria Fabriko komencis penigan esploradon en ĝi. Nun tie estas minejo de soda sulfato kun kompletigitaj instalaĵoj. La de ĝi prilaborita Yuanming-pulvoro okupas la unuan lokon inter la samspecaj produktoj de Ĉinio per sia bona kvalito kaj 95% de ĝi vendiĝas en dekelkaj landoj kaj regionoj.



Yuanming-pulvoro produktita de la fabriko



En la Poŝta Muzeo de Pekino inaŭgurita por festi la 100-an datrevenon de la fondiĝo de la Pekina Poŝta Buroo

TIBETA EDUKADO EN DISVOLVIĜO

La moderna tibeta edukado komenciĝis en 1951, kiam Tibeto pace liberiĝis. Antaŭ 1951 la feŭda servuta reĝimo regis Tibeton kun postĝinta ekonomio kaj malforta edukado. En 1956 Tibeto havis 31 elementajn lernejojn kun ĉ. 2 000 lernantoj. Tujare ekfunkciis ĝia unua mezlernejo kun 650 lernantoj.

Por disvolvi la modernan edukadon en Tibeto, la centra registaro ellaboris la politikon "Tibeton helpu la tuta lando" kaj samtempe alprenis serion da rimedoj favoraj al Tibeto, kiaj sistemo de stipendio kaj senpaga edukado en ĉiuj lernejoj.

De la mezo de la 50-aj jaroj ĝis nun la centra registaro sendis al Tibeto 6 640 instruistojn el aliaj partoj de Ĉinio. De 1976 ĝis 1982 altlernejoj de aliaj provincoj kulturis 1 325 instruistojn por mezlernejoj de Tibeto. Kaj krome, la ŝtato ekfunkciigis ankaŭ 150 kursojn kaj mezlernejojn por tibetaj lernantoj en aliaj lokoj de Ĉinio. Nun pli ol 8 800 tibetaj geknaboj lernas ekster Tibeto.


En la lastaj jaroj la ĉina registaro asignis grandan monsumon al disvastigo de disaŭdiga kaj televida edukado en Tibeto. La altlernejoj kaj ankaŭ iuj mezlernejoj en Tibeto havas klasĉambrojn por instruado aŭdovida, fonetika kaj komputerika.

Tibeto havas 2 912 lernejojn, inter kiuj estas kvar altlernejoj, 15 teknikaj kolegioj, 62 mezlernejoj kaj 2 831 elementaj lernejoj, kun 222 000 lernantoj.




Kun seriozeco

Foto de YU XIANGJUN



Ekzercado
Foto de YU XIANGJUN



**Biologia leciono en la Tibeta
Universitato**
Foto de DU ZEQUAN

**Muzikinstruisto kaj liaj
lernantoj**
Foto de DU ZEQUAN



**Aŭdovida leciono en
mezlernejo**
Foto de DU ZEQUAN



Unuaj loĝantoj de Pekino



La ruino de prahomoj en la urbocentro de Pekino

FINE de decembro 1996, en konstruejo de Wangfujing, komerca centro de Pekino, ĉinaj arkeologoj malkovris iom da karbograjnoj, bruligitaj ostoj kaj pecoj de ŝtonaj fajriloj. La eltrovaĵoj apartenas al la fino de paleolitiko, antaŭ ĉ. 22 000 jaroj. Tio estas rara restaĵo de prahomoj sur ebenaĵo.

Oni plu prifosis kaj rikoltis pli multe. Sur ruino kun areo de pli ol 200 kvadrataj metroj troviĝas tri karbokavoj kun karbograjnoj, bruligitaj ostoj kaj cindro, kie prahomoj uzis fajron. Iu arkeologo de Pekino diris, ke antaŭe en la okcidenta kaj norda montregionoj de Pekino oni malkovris ruinion de prahomoj kaj unuafoje oni malkovris iliajn restaĵojn sur ebenaĵo de Pekino.

Pekino situas ĉe la orienta fino de Eŭrazio, je 150 km for de Bohai-marĉo. Pratempe la kvanto de precipitaĵo superis 600 mm, riveroj multis kaj arbaroj prosperis, tial la loko taŭgis por vivado de homoj. En la 2-a de decembro 1929, en Zhoukoudian, Pekino, ĉinaj arkeologoj malkovris perfektan fosilion de kranio de pekina prahomo (antaŭ 690 mil jaroj, t.e. meze de plejstoceno), poste ŝtonajn instrumentojn kaj ruinion de fajro-uzado. Kaj Pekino fariĝis loko kun paleolitikaj eltrovaĵoj plej riĉaj kaj sistemaj en la mondo.

Por plu koni la lulilon de la paleolitika kulturo de Pekino kaj esplori ruinion de pekinaj prahomoj kaj iliaj posteuloj, en la jaro 1990 ĉinaj arkeologoj komencis esploradon por longa tempo en la okcidenta kaj norda montregionoj. En la sekvantaj 6 jaroj ili trovis 30 ruinojn ĉe riverujoj, kie prahomoj de paleolitiko aktivis, kaj elfosis 600 ŝto-

najojn. Ili rimarkis, ke konsidere la eltrovaĵojn de paleolitiko kun la ruinoj transiraj de paleolitiko al neolitiko, oni povas koni la tendencon de evoluo de la paleolitika kulturo al la neolitika kaj la procezon de migrado de pekinaj prahomoj de montregiono al ebenaĵo. Sed sur la ebenaĵo oni malkovris neniun signon de aktivado de paleolitikaj prahomoj.

La ruino en Wangfujing okupas 2 000 kvadratajn metrojn, je 12 metroj sub la tersurfaco. La restaĵoj montras ke iu tribo de prahomoj aktivis tie. Laŭ la stratumo oni konstatis ke tie estis rivero kaj lago. Tiam homoj fiŝis kaj ĉasis laŭ sezonoj kaj migris iom post iom de montregiono al ebenaĵo. Oni povas imagi, ke en la frua plejstoceno maro inundis la pekinan ebenaĵon. Poste la marakvo forfluis kaj la ebenaĵo reaperis. Tie abundis akvo, herboj kaj animaloj, kaj ĉe la fino de plejstoceno pekinaj prahomoj, kiuj vivis de ĉasado, migris al ebenaĵo kaj fariĝis unuaj loĝantoj de Pekino.

La malkovro de la ruino en Wangfujing plenis blankon de studo pri la prahistorio de la ebenaĵa regiono de Pekino. Samtempe tio havas gravan signifon por esplori la karakterizaĵojn de la kulturo de paleolitiko de Pekino, la evoluon de antikva medio kaj geografio kaj la aktivadon de prahomoj de Pekino. En venontaj tagoj sciencaj esploristoj unuflanke faros profundan prifosadon kaj arkeologian analizon kaj aliflanke faros esploradon de multaj fakoj, ekzemple stratigrafio, paleontologio, paleogeografio kaj mikropaleontologio. ■

FIŜISTOJ ĈE ERHAI-LAGO

Teksto de ZHAO WENKUI kaj YANG SHIBIN

Fotoj de YANG SHIBIN

ĈE urbeto, sur du grandaj banjanoj, sidas miloj kaj miloj da ardeoj. Frumatene, ili flugas al lagbordo por serĉi mangaĵon, dume baj-aj fiŝistoj movas boatojn por kapti fiŝojn. Tiu urbeto, kie harmonie kunvivas la homoj kaj la birdoj, estas nomata Xizhou (Ŝjiĝoŭ) sidanta ĉe Diancang-monto kaj Erhai-lago.

La klara lagakvo bluas kiel la ĉielo. La fiŝistoj manipulantaj ĉu fiŝkanojn, ĉu fiŝretojn, aspektas serenaj kaj senzorgaj. La fiŝagloj sagacaj kiel ĉashundo foje-refoje buŝe portas fiŝojn el la akvo kaj ricevas de la mastro fiŝetojn aŭ gastropodojn kiel rekompenco. La fiŝistoj surlage pasigas sian tutan tagon. Tagmeze, el ĉiuj kajutoj leviĝas kuirfumo. Vespere, la subiranta suno orangigas la ĉielon, la lagon kaj la revenantajn boatojn. Ekbruas la urbeto, ripozas la ardeoj sur la banjanoj, kaj la fiŝistoj postlasas siajn piedsignojn sur la ŝtonplata vojo...

La fiŝistoj estas gastamaj. Se vi eniras en iun ajn antikvecan domon, la gastigantoj regalas vin tri-foje per teo laŭ la baj-a maniero: Je la unua fojo estas amara teo preparita el tefolioj rostitaj en argila pota sur fajro, je la dua estas dolĉa teo konsistanta el juglando kaj bruna sukero, kaj je la tria estas gustoreveka teo el zingibro, zantoksilo (*Zanthoxylum bungeanum*), mielo ktp. La gastigantoj klarigas, ke ili unue trinkigas al vi amaran teon, por ke vi sentu malfacilecon de la vivo, kaj poste proponas al vi dolĉan teon por deziri al vi mielan vivon. La loĝantoj estas fieraj pro siaj prapatroj kaj la 2100-jara historio de la urbeto. Ili konigas, ke ne ĉiuj iliaj prapatroj sin vivtenis per fiŝkaptado, ili scipovis teksu kaj lig-tinkuri ŝtofon, kaj la komerco de lig-tinkuritaj ŝtofoj prosperis enlande kaj en Birmo, Hindio... Tiel la urbeto fariĝis grava en komerco sur la antikva Suda Silka Vojo. En la 30-aj jaroj de la kuranta jarcento la riĉaj komercistoj konstruis tie multe da domoj kaj postlasis al la urbeto malnovajn domojn luksajn kun bele ornamitaj traboj.

Ankaŭ la Papilia Fonto estas fiero de la loĝantoj. En ĉiu somerkomenco, la aromo de floroj kaj arboj ĉe la fonto allogas sennombrajn papiliojn. La diverskoloraj papilioj flirtas aŭ interkroĉiĝas unu al alia

en ĉenoj pendantaj de la arbosupro ĝis la lagsurfaco. Antikvuloj notis tian mirindan spektaklon, kiu nun ankoraŭ allogas sennombrajn vizitantojn de malproksime. Pro tio la urbeto fariĝis fama turisma loko. Ankaŭ virinoj ĉe Erhai-lago sin okupas pri turisma komerco. El lig-tinkurita ŝtofo ili faras vestojn kaj jupeojn kun brodita bordero kaj vendas ilin al turistoj.

Same kiel ĉiuj aliaj baj-oj, la tieaj fiŝistoj kredas je Propra Dio, kiu estas imperiestro, popola heroo aŭ totemo. Unu aŭ kelkaj vilaĝoj kredas je unu Propra Dio. Ĉiu vilaĝo havas templon de Propra Dio. Propra Dio estas rigardata kiel patrona dio de la vilaĝo. En la 23-25-a de la kvara monato laŭ la ĉina luna kalendaro la baj-oj solenas la Feston de Propra Dio. Tiam la vilaĝanoj loĝantaj ĉirkaŭ Erhai-lago, gvidate de la plejaĝulo, kaj kantas kaj dancas, kaj kolektiĝas en la plej granda templo de la urbeto por preĝi por riĉa rikolto kaj longa vivo. Post tutnokta amuzado oni iras al Erhai-lago kaj pie kultas Dion de Lago. ■

Alilanda turisto kun sia knabineto en baj-aj vestoj





Kultado de la dio de lago



Nova okupo de fiŝkaptistinoj

Fiŝista familio





Fiškaptado sur lago

En la urbeto



Profunda sento de germanaj geedzoj



En 1993 Ĉinio premiis geedzojn Klätte per "Medalo de Amikeco".

LA lastajn jarojn en Wuhan, urbo ĉe Yangzrivero, oni laŭdis germanajn geedzojn, kiuj multe kontribuis al mensa resaniĝo. Jen psikiatro Hainz Klätte kaj lia edzino Rosa Klätte.

S-ro Klätte, pli-ol-70-jara, estis la unua prezidanto de la Germana Asocio por Mensa Resaniĝo. Rosa estis specialistino pri nemedikamenta kuracado de mensmalsanulo.

En 1986, invite de du institutoj de Wuhan, la

ĵus emeritigintaj gesinjoroj Klätte fariĝis iliaj instruistoj de la germana lingvo. Poste ili rimarkis, ke la nivelo de resaniĝo de menso ne estas alta en la urbo kaj sur strato vagas mensmalsanuloj. Kun amika sento al la ĉina popolo gesinjoroj Klätte volis denove praktiki sian malnovan profesion. Koncerna departemento de Wuhan subtenis ilian ideon. Februare de 1988 s-ro Klätte fariĝis honora direktoro de la Centro de Mensa Resaniĝo de Jiang'an-distrikto.

La gesinjoroj rimarkis, ke la nomita centro estas ne bone ekipita. La kuracado kaj administrado estis postĝintaj, malsanuloj estis ŝlositaj en ĉambro, sen komunikado kaj amuzo. Iuvespere gesinjoroj Klätte interkonsiliĝis pri apliko de internacie avangarda metodo kuraci mensmalsanon. Sed de kie venas mono? Tiu de la loka registaro ne sufiĉas, necesas peti mondonacon eksterlande.

Gesinjoroj Klätte ekveturis. Unue ili revenis Germanion, poste iris al Hongkong. Dank' al ili, mono kaj ekipaĵoj multe venis. Junie de 1992 ekfunkciis la Ĉina-Germana Taga Hospitalo de Mensa Malsano. Ĝi estas la unua tia ĉina organizo, kiu flegas malsanulojn dum iliaj familianoj laboras.

La hospitalo aplikas malferman kuracan metodon, kiu emfazas kunlaboron inter la familio kaj la socio, kaj evitas ferman terapion, kiu nur dependas de la hospitalo kaj kaŭzas, ke la malsanuloj post elhospitaliĝo ne povas kontakti sanajn homojn nek vivi sendepende. Krom medikamento, la hospitalo aplikas ankaŭ psikologion kaj ago-medicinon por ekzerci diversajn kapablojn de la malsanuloj, teni ilian kuracan efikon kaj ebligi al ili kunordiĝi kun la socio.

Iutage, preterirante laĝeton, Rosa rimarkis, ke iu virino iras kaj reiras en akvo profunda ĝis la talio. Rosa konkludis, ke ŝi estas mensmalsanulino. Rosa kondukis ŝin al la hospitalo. Chen Lirong, direktoro de la hospitalo, diris: "En la lastaj jaroj gesinjoroj Klätte pagis por pli ol 10 malsanuloj, kiujn ili renkontis surstrate kaj kondukis al la hospitalo. La sumo estas konsiderinda."

La hospitalo estas en duetaĝa domo, kiu situas en movoplana distrikto. En la ĉambro de la dua etaĝo mi vidis dekkelkajn gejunulojn, el kiuj iuj skribas, aliaj legas kaj triaj ludas kartojn aŭ tablotenison. Ŝajne ili ne estis malsanuloj, sed vizitantoj de ludejo. La 32-jara Xiong Chunping ĝoje diris al mi, ke kiam ŝi ĵus venis tien, ŝi estis humila, singena kaj silentema, poste kuracistoj helpis ŝin ludi, kuraĝigis ŝin fari murgazeton. Post unu monato ŝi fariĝis optimisma. Mi vidis, ke la vortoj sur la murgazeto estas bone skribitaj kaj la papertondaĵoj bele faritaj. Iu kuracisto diris, ke la murgazeto estis farita de malsanuloj mem, ankaŭ iuj artikoloj estis verkitaj de ili mem.

La najbara ĉambro estas oficejo de s-ro Klätte. Li diris al mi: "Ofte mensmalsano estas malpli grava ol nedecaj agoj de mensmalsanuloj. Oni malestimas kaj mokas ilin kaj iliaj edz(in)oj forlasas ilin, kio daŭrigas ilian malsanon. Tial la plej efika rimedo estas kontakti ilin kiel sanajn homojn."

Dank' al la klopodo de gesinjoroj

Klätte kaj iliaj ĉinaj kolegoj, en la centro aperis, krom la Taga Hospitalo, ankaŭ konvaleskejo, 30-lita hospitalo kaj kuraca laborejo. La centro formis novan medicinan sistemon kombini hospitalajn kaj nehospitalajn laborojn, kaj malferman administradon kaj sintezan kuracadon. Por plibonigi resanigan servon al mensmalsanuloj, ili kune kun la loka registaro fondis la Federacion de Mens-resanigo, kiu ne nur ensorbas sciojn kaj spertojn de Eŭropo, precipe de Germanio, pri flegado de mensmalsanuloj, sed ankaŭ konsideras la ĉinajn cirkonstancojn. Dank' al gesinjoroj Klätte, la federacio ricevis mondonacon de eksterlando.

Por tiu laboro gesinjoroj Klätte petis eksterlandajn mondonacon kaj ekipaĵojn (entute 10 milionoj da juanoj, aŭ pli ol miliono da usonaj dolaroj). Krome, ili plurfoje donacis sian ŝparitan monon. Por konstrui la kuracan laborejon, ili donacis 100 000 juanojn; Rosa aĉetis instrumentojn per sia jara subvencio de 100 000 juanoj. Al malsanuloj ili estis tre malavaraj, sed mem vivis ŝpareme, loĝis en malluksa domo, veturis per biciklo kaj manĝis simple.

Somere de 1992 iliaj gefiloj vizitis ilin en Ĉinio kaj vidis, ke ili vivas tiel modeste, kaj petegis ilin reveni hejmen, sed la gemaljunuloj ne volis. La 15-an de oktobro 1995 Rosa forpasis pro malsano. S-ro Klätte iam pensis adiaŭi Ĉinion, li foriris kaj revenis, li diris, ke li nur ĵus komencis la karieron en Wuhan.

Lia celo estas fondi en Jiang'an-distrikto, eĉ en Wuhan, reton de preventado de mensmalsano, por ke malsanuloj ricevu plej bonan prizorgadon, por ke la civitanoj komprenu, ke post racia kuracado plejmulto da malsanuloj povas mildigi sian malsanon, vivi sendepende kaj partopreni laboron; kaj por ke oni rigardu malsanulojn kaj iliajn familiojn kiel normalajn membrojn de la socio.


La lastajn jarojn 15 000 malsanuloj vizitis la centron, 1 000 homoj estis kuracitaj, 70% el ili ekvivis kiel sanaj homoj kaj multaj familioj revigliĝis. ■






Rutina kutimo

Karikaturo de XIA QINGQUAN

HONGKONG HODIAŮ





1. Parto de Hongkong
Foto de SUN YIFU
2. Aperturo de submara tunelo
Foto de LI JIN
3. En la Ĉemara Parko
Foto de SUN YIFU
4. En kafejo
Foto de SHEN YANTAI
5. En la strato Causeway Bay

1	2
3	4
5	

Universitato investita de entreprenisto

EN hela klasĉambro mi vidis, ke blindaj studentoj de la fakultato pri ĉina medicino brajle faris noton. En la leciono de la fakultato pri metiarto, surdamutuloj mimike respondis demandojn de instruisto. Ding Xiaoaan kripligis je manoj jam en la infaneco. Tenante penikon per piedfingroj, li diligente pentris, post nelonge sur papero aperis aglo fiere staranta sur montpinto. En la ĉambro de komputeroj, iu serioze miopa lernanto fiksas sian rigardon sur ekrano, pene distingis la literojn kaj signojn kaj per la du manoj ritme frapis klavaron.

Tiu estas la unua alta lernejo por kripluloj en la ĉina historio — Yongkang-Universitato por Kripluloj. Ĝi situas en Yantai, bela marborda urbo de Shandong-provinco, orienta Ĉinio. Estas menciinde, ke ĝia raktoro Ren Zhixin estas mastro de privata entrepreno.

Ren Zhixin naskiĝis en vilaĝo de Shandong. En la aĝo de 18 jaroj li foriris de la hejmloko kun nur 70 juanoj. Li vagis en multaj lokoj kaj por sin vivteni li faris diversajn laborojn. La politiko de reformado kaj pord-malfermo donis al li bonŝancon. En suda Ĉinio li entreprenis hotelon, funkciig-

Ding Xiaoaan pentras per piedo.




is vesto-fabrikon kaj kompanion de surakva transporto, en ĉiu el ili nun laboras pli ol mil laboristoj. En 1994 Ren Zhixin revenis hejmen, fondis kompanion (grupo) Yongkang en Yantai. Nun ĝia jara vendoaloro atingis 300 milionojn da juanoj.

Riĉiĝinte, Ren Zhixin deziris pli bone servi al la socio. Ĝuste tiam lin vizitis lia amiko, kiu lamentis, dirante, ke en sinsekvaj du jaroj lia kripla filo partoprenis en la enira ekzameno de universitato kaj dufoje atingis bonajn poentojn, tamen oni ne akceptis lin pro lia kripleco. Tial la filo dronigis sin en rivero. La tragedio animskuis Ren Zhixin. Li pensis, ke en Ĉinio estas 60 milionoj da kripluloj. Post deviga edukado, ili plejparte perdis ŝancon por plu studi. Se li fondos universitaton por kripluloj, tio estos signifoplena ne nur por la kripluloj, sed ankaŭ por la tuta socio.

Ren Zhixin tuj ekagis. Li elspezis 10 milionojn da juanoj por la universitata domo, instruiloj kaj instruistoj. La 13-an de oktobro, 1995, sankciite de la Eduka Komisiono de Shandong-provinco, la universitato oficiale ekfunkciis. Tiutage venis al ĝi el la tuta Ĉinio 1 000 homoj, kiuj anoncis sin por tie lerni. Tie oni studas du jarojn. En la universitato estas fakultatoj pri ĉina medicino, metiarto, kontado, juro, komputiko ktp. Ĉiu fako donas 18-20 kursojn dum la du jaroj. En la universitato laboras 32 instruistoj, el kiuj 11 estas profesoroj kaj vicprofesoroj. Kaj krome tie prelegas ankaŭ specialistoj kaj erudiciuloj de aliaj universitatoj. La lernejo ofte okazigas internacian simpozion. Nun ĝi kaj la Kriplula Universitato de Seulo, Koreio, estas ĝemelaj lernejoj.

Nun tie lernas 200 kriplaj studentoj. Same kiel Ren Zhixin, ili ĉiuj havas idealon servi al siaj patrolando kaj popolo. Ding Xiaoaan, kiu pentras per piedo, orfiĝis nelonge post sia naskiĝo. Li finis elementan lernadon en Bonstatiga Lernejo de Wuhan. Helpe de la bonstatiga lernejo, li daŭrigis la lernadon en mezlernejo. Nun la bonstatiga lernejo pagas por lia ĉiutaga vivo kaj studo en la universitato. Ding Xiaoaan diris: “Mankas al la bonstatiga lernejo instruisto, post diplomitiĝo mi iros tien instrui.”

Ne sufiĉas por la universitato monhelpo nur de unu persono, unu kompanio. Ren Zhixin planas fondi “Fonduson Ren Zhixin” por ke la tuta socio helpu la universitaton kaj faru ĝin perfekta lernejo. Kia estos la universitato en la estonteco? Ren Zhixin skizis ĝin tiamaniere: Ĝi kovros areon de 67 hektaroj en orienta Yantai ĉe maro kaj apud monto. En ĝi estos instrua domaro inkl. de biblioteko, laboratorio, komputera centro ktp.; konvaleska tereno, eksperimenta fabriko, ofidomo kaj ĝardeno. Ĉe la enirejo staros statuo de Konfuceo, tio aludas lojalecon al la patrolando kaj nacio, respekton al la popolo kaj gepatroj. ■



Plej okcidentaj pasejoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

POR prosperiĝo de la Silka Vojo imperiestro Liu Che (140-88 a.K. sur la trono) de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.) starigis la prefektojn Wuwei, Zhangye, Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) kaj Dunhuang en la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero. Samtempe, li konstruigis po unu pasejon en la lokoj je 80 km sudokcidente kaj nordokcidente de Dunhuang. Ambaŭ pasejoj, gardataj de grandaj garnizonoj, interligiĝis per la Granda Muro kun alarmturoj. Siatempe ili servis kiel gardantoj de Dunhuang kaj tra ili oni veturis al centra kaj okcidenta Azio kaj Eŭropo.

YANGGUAN-PASEJO EN KVIETECO

En kvieta vesperkrepusko ni vizitis la lokon, kie majestis Yangguan-pasejo antaŭe. Ĝi jam malaperis kaj eĉ ĝia murbazo estis englutita de la dezerto Taklimakan. La termaso antaŭ ni estis ruino de alarmturo de la pasejo. Ni iris okcidenten kun la celo rigardi la "maron de morto", sed la fora monto baris al ni la vidkampon. Iu paŝtisto diris al ni: "En proksima valo kuŝas fonto, apud kiu estas pli-ol-2 000-jaraj tomboj. Kiuj ripozas en ili, oni ne scias."

La mortintoj en ili, mi pensis, ne estis loĝantoj de urboj fore, sed, probable, garnizonantoj de la pasejo siatempe. Pro kio ili mortis? Ĉu

por protekti la akvofonton kontraŭ subfoso far malamikoj? Je 2.5 km sudoriente de la pasejo kuŝas la laĝeto Wowo el akvo de degelinta neĝo sur Qilian-montaro. Antikvuuloj konstruis tie la pasejon ĝuste surbaze de la ideo: Kun la akvofontoj oni povas firme defendi la pasejon kaj sen akvo la malamikoj tute ne povas fari invadon. Kaj por komercistoj la pasejo estis doganejo kaj ankaŭ ripozejo.


Sen tintado de kamelaj sonoriloj kaj sonorado de signalkornoj, mi nur povis imagi tre malproksiman pasintecon, starante sur Gudongtan antaŭ la pasejo. Oni diris,

ke tie prosperis bazono. Foje, hunoj surprize atakis ĝin kaj la loko fariĝis batalejo. Hodiaŭ oni povas trovi tie bronzajn sagpintojn kaj difektitajn spadojn. Tie estas elterigitaj ankaŭ fajenca agatbido, kupa braceleto kaj porkudra fingringo postlasitaj verŝajne de edzinoj de garnizonantoj.

YUMENGUAN-PASEJO

La nomita pasejo situas je 70 km norde de Yangguan-pasejo. Forlasinte la lastan, ni ekiris en la dezerton, sur kiu kreskis neniu herbo kaj super kiu flugis neniu birdo. Ni laŭiris neklaran "linion"

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





La ruino de grenkonserva kastelo



Pli-ol-700-jara pagodo proksime de Yangguan-pasejo

Foto de SUN ZHIHONG




Yumenguan-pasejo en vespera krepusko

Foto de SUN ZHIHONG



La ruino de Yangguan-pasejo

Foto de SUN ZHIHONG



Parto de la Silka Vojo
Foto de HUANG TAOPENG

jen aperantan, jen malaperantan. Ĝi estas ruino de la Granda Muro inter Yangguan- kaj Yumenguan-pasejoj, konstruita antaŭ 2 000 jaroj el sabloŝtonaj kaj fragmitaj tavoloj, ramitaj unu sur alia. Kun tempopaso, eflorkis sabloŝtona tavolo kaj elstariĝis la fragmita. Tie ni vidis ankaŭ ruinon de alarmturo kaj amasojn da fragmitoj uzataj siatempe por bruligi fajron. Ŝajnis al mi, ke la fragmitaroj fosiliecaj similas al malfermitaj libroj sufiĉe dikaj. Sur nefora duno estas ruino de Yumenguan-pasejo, antikva kvadrata fortikaĵo kun rompita muroj, larĝaj fendoj kaj fragmitoj en ramitaj tavoloj. Ĉirkaŭ ĝi etendiĝas alkala tero, sur kiu kreskas fragmitoj kaj estas postlasitaj hufspuroj.

Laŭdire, Yumenguan-pasejo ricevis la nomon pro tio, ke karavanoj el la regno Yutian, Xinjiang (Ŝingĵang), devis trapasi ĝin por vendi jadpecojn en Ĉinio (la vorto *yumen* signifanta ĉinlingve jadan pardonon). Antikva turisto-bonzo notis, ke en Yutian fluas la riveroj Blanka Jado, Verda Jado kaj Nigra Jado. Ĉiun aŭtunon, kiam sekiga la riveroj, la regnestroj kolektas jadpecojn el la riveroj unue, kaj iliaj popolanoj poste. Antikva poemo tekstas, ke tiam persaj komercistoj aĉetis jadpecojn ĉe la riveroj kaj, trairinte la dezerton en la oriento, ricevis kontrolon de iliaj identigiloj ĉe la pasejo Yumenguan, antaŭ ol ŝanĝi ilin kontraŭ silko de Ĉinio.

Por amikeco kun la landoj de centra kaj okcidenta Azio la ĉina imperiestro Liu Che edzinigis du princinojn al estroj de Wusun-regno. Ambaŭ princinoj, trairinte la pasejon, veturis al la regno. La unua princino, malsana kaj malforta, neniel alkitimiĝis al la tiea nomadismo kaj mortis kvin jarojn poste. La dua princino Xieyou alportis al la regno teknikojn de terkulturado kaj teksado de centra Ĉinio kaj ekspedis palacan virinon Feng Liao, kiu bone konis historion, viziti landojn de centra kaj okcidenta Azio kiel sendito. Kaj tiamaniere Feng Liao fariĝis la

unua diplomatino de antikva Ĉinio.

Por rezisti kontraŭ hunoj kaj pliprosperigi la Silkan Vojon. Ban Chao, sendito de la Orienta Handinastio (25-220), funkciis kiel diplomato dum 30 jaroj en la supre diritaj landoj. Li rigardis Yumenguan-pasejon kiel simbolon de la patrolando. En 102 li estis 71-jara kaj grave malsaniĝis. Pensante, ke li mortos baldaŭ, li leteris al la kortego: "Mi, kiel subulo, ne aŭdacas havi la deziron reveni al Jiuquan, sed mi volus reveni viva al Yumenguan." Unu monaton post sia reveno, li mortis.

Oni ne scias, kiom da antikvaj ĉinoj oferis sian junecon kaj eĉ vivon por defendi la pasejon kaj la Silkan Vojon. Hodiaŭ, la ruinon de la pasejo gardas 16-jara knabo. Li loĝas en malgranda domo je centoj da metroj for de la antikva fortikaĵo, en akompano de kato kaj hundeto, kiu ludas aliloke antaŭtagmeze kaj revenas posttagmeze. En la dezerto ne eblas televidi, kaj la knabo legas multajn novelojn. Li diris al mi, ke lia patro estas gardisto de tiu ruino. Antaŭ kelkaj tagoj li iris al la urbo por aĉeti legomojn kaj dum lia foresto li ser-

vis kiel gardanto anstataŭ sia patro.


Adiaŭinte la knabon, ni venis al la ruino de la kastelo destinita por konservi grenon. Ĝi konstruiĝis borde de rivero, kaj ĉe ĝiaj ambaŭflankoj etendiĝis marĉo. La rivero senakviĝis antaŭ longe kaj tie restis pecoj de muroj kun ventotruoj. Supre de muro staris aglo senmove kvazaŭ muldita el bronzo.

Sur la revenvojo ni rimarkis, ke la tiea eroziita tersurfaco tre similas al ruino de antikva vilaĝo kaj tie kuŝas leŭsa dometo sur deklivo, kun duono subtere. Apud ĝi lokiĝas vaka ŝafstalo konstruita el terpecoj. Antaŭ la stalo hundeto salutis nin per svingado de la vosto.

PETROLLABORISTOJ DE YUMEN

Estas konate, ke Yumen-anoj ekspluatis la plej fruan petrolkampon de Ĉinio.


Ĝi situas sude de la urbo Yumen, najbare de la urbo Jiayuguan. Jam en la 3-a jc, kiam Yumen estis gubernio dependanta de la prefektujo Jiuquan, oni plurfoje faris notojn: "En suda gubernio




Gudongtan



En la petrol-rafinejo de Yumen



Borado de petrol-puto



En labor-paüzo



Tagmanğado



En familio de petrollaboristo

kuŝas ŝtona monto, el kiu defluas fajrofonto. La fluo sulkas la tersurfaco kaj la akvo, netrinkebla, estas grasa kiel buljono. Ĝi forte ek-lumas tuj ĉe bruligo kaj la lokanoj nomas ĝin minerala lako...”

Lokanoj ofte elprenis nigran grason por lumigi ĉambron, lubriki ĉaron, mortigi insektaĉojn, kuraci furunkon kaj eĉ defendi la Silkan Vojon. En 578 tuĝiŭe-oj, kiuj nomadis ĉe Altaĵo, surprize atakis Jiuquan. Yumen-anoj do bruligis per nigra graso la eskalojn, per kiuj la malamikoj pretis supreniri la ĉirkaŭmuron de la urbo. La malamikoj verŝis akvon sur la fajron por estingi ĝin, sed male, la fajro ekbrulis pli forte kaj, rezulte de tio, la urbo estis savita. Laŭdire, la Yumen-anoj uzis fajron en milito 100 jarojn pli frue ol bizancanoj, kiuj petrole bruligis la urbosieĝan floton de araboj.

Promenante laŭ la rivero, nia akompananto rakontis al ni pri historio de la tiea petrol-ekspluato. Montrante dissemitajn grotojn sur la monto trans la rivero, li diris, ke ili estas ĉ. 100-jara loĝejo de antaŭaj petrolkolektantoj, konstruita de loĝantoj de la proksima Ora Vilaĝo, antaŭa kazerno por garnizonoj de la Silka Vojo. Poste, ĝi ne plu servis kiel kazerno kaj en ĝi enloĝiĝis lokanoj, kiuj vivis de orserĉado. Fine de la 19-a jc oni fosis kaldron-similajn kavojn ĉe la riverbordoj. Kiam el ili aperis nafto, oni ĝin vendis al komercistoj. En la okuloj de la lokanoj, la nafto estis donacita de dio. Por kulti lin ili konstruis templon ĉe la rivero.

La supre dirita ĉerpado de nafto estis finita post funkcio de la petrol-kampo ekspluatita en 1939. Tiam en Ĉinio iris la milito kontraŭ la japanaj invadantoj kaj petrolo estis urĝe bezonata. Kelkaj geologoj surkamele rajdis tra la dezerto al Qilian-montaro. Nelonge poste, ili fosis tie la unuan oleputon per moderna tekniko. Sub la tero abundegis nafto. Kiam okazis nafto-ŝpruco, la putoboristoj lasis ŝpruci nafton kiel eble, kun la celo kontentigi la urĝan bezonon de la ŝtato. Ne havante tempon masoni

cisternon el brikoj, ili konstruis digon ĉe la puto por konservi la elŝprucintan nafton. Poste, ili trovis nekonvena senbride ĉerpi nafton, ĉar la oleo elĉerpiĝos post elŝpruco de pli ol 50 000 tunoj da nafto; la nafto, konservata sub libera ĉielo, entenas multe da sablo kaj estas facile tralasebla, vaporigema kaj brulema. Dum ekspluatado de nafto ili senĉese perfektigis la teknikojn. De la ekfunkciigo de la petrol-kampo ĝis la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la produktokvanto de petrolo en Yumen-petrol-kampo konsistigis pli ol 90% de tiu de Ĉinio. Nun la tiea rezervokvanto de nafto fariĝis malgranda. Oni do uzas novajn teknikojn kiel ekzemple plilargigi ole-tralasivajn truojn de la malnovaj oleputoj per biomikroba tekniko por plialtigi la produktokvanton.

Aĉa medio kaj malfacilaj vivkondiĉoj kulturis en Yumen-anoj optimismon kaj neflekseblan spiriton. Kvankam veninte el diversaj partoj de Ĉinio, ili ĝoje pretendis, ke ili estas Yumen-aj indiĝenoj, dirante kun fiero: “Por akiri nafton de la naturo ni volonte laboros dumvive en la dezerto kaj neniam bedaŭros nian decidon.”

Tiutage 33-jara taĉmentestro Jiang Weiping (Ĝjang Ŭejping) kaj liaj kolegoj boris oleputon sur ŝaktoskafaldo. Mi informiĝis de li, ke ili boris jam 20 tagojn kaj la borado finiĝos post unu semajno. Ilia laborvesto estis plena de koto, tamen ili diris ŝerce: “Koto estas bona objekto, ni aŭdis, ke oni beligas sin per ĝi!” Por sekureco ili varmigis tagmanĝon en ferlada domo. Intertempe ili infuzis teon



Riparistino de la petrolkampo

kaj fumis cigaredon, ŝercante unu kun alia.

Sur la konstruejo de nova petrol-rafinejo la direktoro diris al ni, montrante elektroveldiston Xiao Zhao (Ŝjaŭ Ĝaŭ): “Jen, nia junulo brava! La specialaj kupraj tuboj velditaj de li estas bonkvalitaj.” Xiao Zhao klarigis al mi: “En veldloko absolute ne estas veziko granda kiel kudriltruo, nek skorio granda kiel grajno, nek ege malgranda fendo, alie la oletuboj eksplodos sub altaj temperaturo kaj premo.”

En la kazino de la petrol-kampo mi konatiĝis kun petrollaboristinoj. Ili gaje babilis kun mi: “Ni jam aĝas 30 jarojn kaj havas ĉiu infanon. Ni uzas plej bonan paston por ŝirmi la haŭton kontraŭ furioza vento. Tago ni laboras sub libera ĉielo kaj vespere ni dancas en la kazino. Niajn infanojn flegas iliaj geavoj. Ni dancas vespere kaj la gemaljunuloj matene...”

Denove aŭdiĝis muziko. Ili adiaŭis nin kaj rapidis tien, kie oni dancis. ■

Proverboj en la ĉina lingvo

de ZHANG QICHENG



EN la marta n-ro de 1996 de EPC mi verkis artikolon pri idiomoj en la ĉina lingvo. En tiu ĉi artikolo mi pritraktos analogan temon, nome pri proverboj. Simile al idiomoj, ankaŭ proverboj estas neignoreblaj elementoj de nia nacia lingvo. Unue, ili mirinde multas. Laŭ iu vortaristo, ilia nombro eĉ atingas kelkdek milojn; due, ili havas longan historion. Antaŭ 2 000 jaroj, proverboj jam aperis en nia lingvo; trie, pro tio ke ili ne nur estas enhave tre diversaj, sed ankaŭ esprime ege riĉaj. Ili estas vaste uzataj en parolo de la ĉinaj popoloj; kaj kvare, ili estas fluaj kaj belsonaj pro la rimoj, kaj facile cirkulas inter la popoloj.

En la ĉina lingvo proverboj ludas similan rolon kiel idiomoj. Tamen inter ili estas diferenco. La ĉefa

diferenco estas: idiomoj aperis ofte sub la plumo de kleruloj, ili plejparte devenis de klasikaj verkoj, sekve, ilia stilo estas plaĉa; dum proverboj devenis de la buŝo de ordinaraj popoloj, ili aspektas modestaj, krudaj kaj eĉ vulgaraj, sed al ili ne mankas ia modesta beleco pro ilia lerte formita strukturo kaj sprita vorto-uzo. Oni povas diri, ke ĉinaj proverboj estas resumo de la sperto de la popoloj pri homa vivo, produktado kaj sociaj fenomenoj, kaj samtempe ili estas kristaliĝo de la popola saĝo kaj humoro.

Estas konate, ke la ĉinaj popoloj estas diligentaj kaj ŝparemaj, ĉar ili scias, ke nur kun diligenteo kaj ŝparemo ili povas vivi sub mizeraj kondiĉoj. Do, multaj el la proverboj donas instruojn pri diligente-

co kaj laboremo.

Estas proverbo: "Nur se vi laboras pene kaj persiste, vi povas turni feran bastonon en pinglon." Laŭdire, tiu proverbo devenis de anekdoto pri poeto Li Bai (701-762): Li naskiĝis en riĉa familio kaj vivis komforte, li ne diligentis en lernado. Foje, li promenadis apud rivereto kaj vidis, ke iu maljunulino estis frotanta feran bastonon. Kun miro li demandis: "Kial vi faras tion?" La maljunulino respondis: "Mi volas fari ĝin pinglo." Li Bai emociiĝis: "Persiste laborante, oni eĉ povas turni feran bastonon en pinglon!" Post tio Li Bai penege kaj persiste lernis kaj finfine fariĝis granda poeto en antikva Ĉinio. Alia proverbo tekstas: "Kiu maldiligentas dum sia juneco, tiu ĉagreniĝos dum sia maljuneco." Serioze ĝi admonas la junulojn ne malŝpari sian Junecon. Alia proverbo, kiu enhavas similan ideon, sed pli fortan inspiron, estis kreita per trafa komparo inter florphantoj kaj homoj. Jen la teksto: "Florphantoj povas plurfoje reburĝoni, sed homoj povas neniam rejuniĝi." Ankaŭ proverboj pri ŝparemo ne malmultas. Jen mi citas unu el ili: "Diligento sen ŝparemo similas al kudrilo sen fadeno".

Por laboruloj tempo estas valora, sekve estas proverbo por emfazi tiun vidpunkton: "tempo valoras kiel oro, sed tempo ne aĉeteblas per oro." Verŝajne, tiu proverbo estas pli figura kaj impresa ol la diro "tempo signifas monon".

En Ĉinio oni ĉiam emfazas la gravecon de volo aŭ ambicio por fariĝi kapabla kaj kompetenta. "Kiu havas firman volon, finfine sukcesos" kaj "Oni povas malhavi riĉaĵon, sed ne devas malhavi ambicion" estas tipaj proverboj tiaspecaj.

Estas proverbo, kiu instruas honestecon. Ĝi tekstas: "Homo ne povas kaŝi sian eraron, same kiel papero ne povas enteni fajron." Tiu proverbo rimarkigas, ke oni ne kaŝu la fakton, ĉar vero finfine malkovriĝos.

En la ĉina lingvo troveblas multaj proverboj pri agrikulturo kaj meteorologio kreitaj de kamparanoj laŭ ilia sperto en terkulturo kaj observado de vetero. Ili kreiĝis ne surbaze de sciencaj scioj, ne ĉiuj teorie ĝustaj, sed, laŭ fakuloj, parto el ili ja konformas al la natura leĝo. Jen kelkaj ekzemploj: "Sen frosto vintre kaj sen varmego somere, ne estos riĉa grenrikolto aŭtune"; "Printempa pluvo valoras kiel oleo"; "Kiam la hirundoj flugas malalte kaj la formikoj transloĝiĝas al nova formikejo, tio prognozas pluvon."

En la malnova socio de Ĉinio, la vivkondiĉoj inter riĉuloj kaj malriĉuloj estis ege diferencaj, sekve aperis proverboj, kiuj tre figure spegulas tiun kontraston. Ekz., "Festeno de riĉulo kostas duonjaran grenkonsumadon de malriĉulo"; "Por la kvar sezonoj riĉulo havas vestojn, dum malriĉulo veston

por la kvar sezonoj." En la dua ekzemplo oni trovas, ke la frazo estas tiel lerte aranĝita, ke ĝi donas tre profundan impreson al la aŭskultantoj.

Por montri ke ĉinaj proverboj estas tre diversspecaj, mi donas ekzemplon pri sanprotektado. Jen teksto: "Post mango marŝu cent paŝojn kaj vi vivos 99 jarojn." Sendube, tiu proverbo taŭgas por ĉiuj.

En la homa socio troviĝas ĉiaspecaj homoj kaj aferoj. Por speguli ilin per koncizaj frazoj en proverboj estas malfacile, tamen la ĉinaj popolanoj povas fari tion per sia saĝo. Ĉi-sube estas tipaj ekzemploj:

1. "Unuflanka deziro". Por tiu proverbo oni havas tre interesan rakonton: "En iu familio estis ĉarma fraŭlino, al kiu volis svatiĝi du junuloj, unu el orienta najbara familio kaj la alia el okcidenta. La junulo el la orienta estis riĉa, sed malbela, dum tiu el la okcidenta estis bela, sed mizera. La gepatroj de la fraŭlino hezitis fari decidon. Do, ili demandis sian filinon, kiun ŝi preferas. La filino respondis, ke ŝi volas ambaŭ. Kun miro la gepatroj demandis, kiel povas esti tia edziniĝo. La filino diris, ke ŝi deziras tagmanĝi en la orienta familio kaj tranokti en la okcidenta." Memkompreneble, tia unuflanka deziro estas ridinde absurda kaj absolute nerealigebla, tamen en la reala vivo, eĉ en la politika kampo, ĝi ja estas trovebla. Ekz., la japanaj militaristoj lanĉis agreson kontraŭ multaj aziaj landoj dum la Dua Mondmilito, tio estas historia fakto skribita per la sango de miliono da homoj, inkluzive tiun de japanaj soldatoj. Sed iuj japanaj dekstremaj politikistoj eĉ tiun fakton volas nei per absurdoj. Ĉu tia ideo ne estas unuflanka deziro en la vera senco de la proverbo?

2. "Kiam unu bonzo vivas sola, li ĉiam surŝultrigas du sitelojn per vekto por ĉerpi trinkakvon; kiam du bonzoj loĝas kune, ili duope surŝultrigas unu sitelon per vekto por ĉerpi trinkakvon; sed kiam tri bonzoj loĝas kune, ili ne plu havas akvon por trinki." Tiu proverbo humure mokas homojn, kiuj emas elturniĝi el laboro por komuna avantaĝo.

El la supre cititaj ekzemploj oni rimarkas, ke la ĉinaj proverboj ofte enhavas profundan filozofian signifon per metaforo de ordinaraj objektoj kaj aferoj.

Cetere, sin trovas proverboj kreitaj tute laŭ malnova koncepto pri homa vivo, etika moralo k.s., ekz., estas proverboj, kiuj esence kontestis la egalrajtecon de virinoj kaj pledis por la submetiĝo de virinoj al viroj. Tiaj proverboj jam fariĝis lingva rubo kaj ne plu cirkulas.

Per tiu ĉi artikolo mi klopodas doni al la legantoj simplan konturon de ĉinaj proverboj, por ke ili havu ĝeneralan impreson pri tiu lingva elemento de la ĉina lingvo. Ĝuste kiel la ĉina proverbo diras: "Kia la semo, tia la rikolto", mi esperas, ke mia klopodo ne estos tute senrikolta. ■

Terglobaj riĉfontoj kaj kontinuiigebla disvolviĝo

ANTAŭ apero de la homaro la naturaĵoj sur la terglobo, kiaj tero, akvo, minaĵo, aero, arbaro kaj herbejo, evoluis laŭ sia propra leĝo. Kaj post sia apero la homaro profitis de tiuj naturaj riĉfontoj.

Kiel do statas naturaj riĉfontoj

sur nia terglobo? Jen detalaĵoj.

La tergloba surfaco kun areo de 511 milionoj da kvadrataj kilometroj estas kovrita de oceanoj je pli ol 70% kaj de tero je 29%. La tero, kiel kompleksa ekologia sistemo, areojn 150 milionojn da

kvadrataj kilometroj, inter kiuj 30% estas kultureblaj.

Akvo estas grava materia bazo por ĉiuj vivaĵoj sur la terglobo. Inter la ĉ. 1.4 miliardoj da kubkilometroj da akvo 97% estas marakvo kaj 3% — dolĉakvo. Laŭ takso, inter la 10 milionoj da specioj de vivaĵoj sur la terglobo ĉ. 1.6 milionoj estas kvalifigitaj kaj nomitaj. Arbara riĉfonto estas la plej granda ekologia sistemo de la terglobo. Ĝi ne nur liveras lignon al la homaro, sed ankaŭ ludas gravan rolon en la materia kaj energia cirkulado de la terglobo. Ĝi estas ankaŭ giganta genobanko. Kiel regeneriva riĉfonto, herbejo liveras materian fonton al la vivo de la homaro kaj bestaro. Ĝi kovras preskaŭ duonon de la tero.

Tero, arbaro kaj herbejo, renovigeblaj kaj ripetfoje uzeblaj, estas nomataj regeneriva riĉfonto, kaj mineralo — neregeneriva riĉfonto. Ĝis nun la homaro eltrovis 3 300 mineralojn, el kiuj 160 estas enlistigitaj kiel mineralaj riĉfontoj kaj 40 havas valoron gravan por ekonomio. Plie, la maro estos ankaŭ ĉefa spaco de homaj aktivadoj en la estonteco.

Kio estas karakterizaĵoj de la terglobaj riĉfontoj?

Unue, integreco de riĉfonta sistemo kaj rilato inter diversaj riĉfontoj. La naturaj riĉfontoj es-

Tervarmo utiligata por bredado de angiloj en Fuzhou



tas kompleta tuto. Ĉiuj riĉfontoj efikas unu sur alian kaj retenas unu alian en biosfero, tiel ke formiĝas kompleta ekologia sistemo de riĉfontoj. Eksploatado aŭ evoluado de unu riĉfonto efikas sur alian.

Due, limigiteco de riĉfonto. Neniu riĉfonto estas neelĉerpebla. Mineralo estas riĉfonto neregeneriva, kiu malmultiĝas tagon post tago. Kvankam tero, akvo, vivaĵo ktp. estas regenerivaj, tamen neracia uzado de ili kaŭzos akvan polucion, grundan erozion, rapidan reduktiĝon de arbaro kaj degeneradon de herbejo. Tiam la utiligeblaj riĉfontoj iom post iom malmultiĝos.

Trie, neekvilibro de riĉfonta dispozicio. Ni prenu arbaran riĉfonton kiel ekzemplon. Suda Ameriko estas kovrita de arbaro je 51.4%, Norda Ameriko je 36.6%, Eŭropo je 30.5%, Afriko je 24.5%, Azio je 22% kaj Oceanio je 18.9%.

Kvare, evoluemo de riĉfonta sistemo. Inter la tergloba riĉfonta sistemo kaj la homara socia sistemo ekzistas eterna kontraŭdiro. La utiligo de riĉfontoj far la homaro kaŭzas al ili ŝanĝiĝon en specio, kvanto, kvalito kaj dispozicio. Ekz., kresko de la loĝantaro, senĉesa plialtiĝo de homa vivnivelo, pligrandiĝo de bezono de pokapa riĉfonta kvanto, ĉio ĉi tio kaŭzas kreskon de riĉfonta konsumkvanto. Homaj aktivadoj kaŭzas malaltiĝon de media kvalito, malaltiĝon aŭ eĉ partan pereon de regeneriveco de riĉfontoj.

Rimarkindas, ke nun eksploatado kaj utiligado de riĉfontoj ne konas limon inter regionoj aŭ landoj kaj ankaŭ disponado de riĉfontoj estas farata internacie aŭ tutmonde. Jen serio da problemoj koncerne la tutan terglobon:

La problemo de la tergloba medio. Pro homaj aktivadoj, precipe pro la reciproka efiko inter

la homaj aktivadoj unuflanke kaj la atmosfero, akvosfero kaj biosfero aliflanke, serioziĝas la problemo de tersurfaca medio. Ekz., la forceja efiko, kaŭzita de konsumado de granda kvanto da kemiaj brulaĵoj, detruas la ozonan tavolon kaj plivarmigas la atmosferon.

La problemo de regiona medio sur la terglobo. Neracia utiligado de riĉfontoj kaŭzis teran degeneradon, reduktiĝon de vivajaj specioj kaj senbridan hakadon de arboj. Ekz., neracia utiligo de kampoj dezertigis du miliardojn da hektaroj da tero; 2.6 miliardoj da hektaroj da tero estas minacataj de grunda erozio kaj trosekeco; senbrida hakado de arboj kaŭzis pereon de sen nombraj animaloj kaj vegetaloj. En la tropikaj arbaroj pereas ĉiutage almenaŭ unu specio de vivaĵo.

Industria polucio. Ekz., la plimultiĝanta gaso, ellasita el ĉiuj landoj, kaŭzas acidan pluvon, poluciantan la medion kadre de la tuta mondo.

La media problemo kaŭzita de natura katastrofo. Ekz., erupcio, grava tertremo, ŝoviĝo de monto ktp., ĉiuj damaĝas la ekologian medion de la terglobo.

Fronte al la akriĝantaj kontraŭdiroj inter riĉfontoj kaj medio, inter loĝantaro kaj evoluo, la homaro ne povas ne ekkoni denove la rilaton inter si kaj la naturo: Ĉu plue persisti en tradiciaj konceptoj pri disvolviĝo aŭ klopodi starigi novan formon, en kiu la homaro kaj la naturo kune ekzistas harmonie kaj disvolvas sin bonorde? En 1987 la Konferenco de Medio kaj Disvolviĝo de UN traktis la koncepton pri kontinuuigebla disvolviĝo kaj difinis ĝin per la jeno: "Plenumante la bezonon de la nuna homaro en la vivo, ne damaĝu la povon de iliaj posteuloj pri tiu bezono."

Kiel do realigi la kontinuuige-

blan disvolviĝon? Laŭ fakuloj, necesas solvi jenajn problemojn:

Limigi la kvanton de la loĝantaro kaj altigi ĝian kvaliton. Nun la loĝantaro de la mondo proksimiĝas al ses miliardoj. Tagon post tago serioziĝas la kontraŭdiro inter tro rapida kresko de la loĝantaro kaj relativa manko de riĉfontoj. Precipe en la evoluantaj landoj, la ŝarĝo de la loĝantaro sur la tera riĉfonto fariĝas pli kaj pli peza. Tial, limigi loĝantar-kvanton estas plej grava paŝo por fari kontinuuigeblan disvolviĝon.

Forigi malriĉecon. En la mondo 800 milionoj da homoj restas en malriĉeco kaj estas minacataj de malsato kaj malsano. Pro malriĉeco ili ne havas forton por fari kontinuuigeblan disvolviĝon de riĉfontoj kaj efikan mediprotekton.

Forigi la neegalecon de disvolviĝo inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj. Inter la evoluintaj kaj evoluantaj landoj ekzistas neegaleco de riĉfontaj konsumado kaj komercado kaj mediprotekto. Por protekti siajn riĉfontojn kaj medion la evoluintaj landoj ĝenerale importas lignon, energion kaj mineralojn el evoluantaj landoj kaj translokas riĉfontokonsumantan kaj medio-poluciantan kemi-industrion en evoluantaj landojn, kio kaŭzas interregionan translokiĝon de riĉfonta konsumado kaj media polucio. Por kontinuuigebla disvolviĝo en la mondo la evoluintaj landoj nepre devas ŝanĝi sian konsummanieron kaj bremsi multan konsumadon de riĉfontoj. Kaj por forigi polucion kaj protekti la medion kaj komunajn riĉfontojn la evoluintaj landoj devas fari pli multe.

Kontinuuigebla disvolviĝo ne estas afero de unu lando aŭ regiono, sed komuna celo de la homaro. Tial, necesas fari internacian kunlaboron por solvi median problemon kaŭzitan de riĉfonta eksploatado kaj ekonomia disvolviĝo sur la terglobo. ■

Bonzinoj en Qiming-templo

Teksto kaj fotoj de HUANG WEN

Je duono post la kvara matene la bonzinoj en Qiming-templo en antaŭurbo de Xiamen komencas reciti sutron kun akompano de tamburado kaj frapado de ligna fiŝo. La sutrorecito daŭras ĝis tagiĝo.

En la templo vivas bonzinoj el 18 provincoj kaj municipoj de Ĉinio. Inter ili Jue Chang (Ĝjue Ĉang) komencis vegetaran vivon en la aĝo de 15 jaroj kaj ofte incensis en proksima templo antaŭ bonziniĝo. Ŝi decidis fariĝi bonzino pro tio, ke foje ŝi legis budhisman sutron kaj trovis en ĝi misteran filozofion pri homa vivo. 22-jara, ŝi bonziniĝis, malgraŭ la opono de siaj gepatroj. Por akiri pli da budhismaj scioj, ŝi forlasis sian hejmlokon kaj eklernis en Qiming-templo.

Same kiel bonzoj, bonzinoj portas frokon kaj


sekvas vegetaran dieton. Por-bonzinoj plej gravas reciti sutron ĉiutage frumatene kaj posttagmeze. Iom post iom ili povas parkerigi la sutron, ĉar ili kredas nirvanon atingebla per sutrorecito kaj memkulturo.

La bonzinoj pledas por sinrego. Se iŭ el ili ne volas bonzinan vivon, ŝi povas rekomenci sekularan vivon. En la templo, krom reciti sutron kaj lerni budhismon, ili ankaŭ legas gazeton kaj ĵurnalon, aŭskultas radio-elsendon kaj ludas volan.

La bonzinoj telefone rilatas kun la ekstera mondo. Iu el ili telefone petis, ke Radio Xiamen elsendu la kanton "Pacon al Bonkoruloj", kaj per tio adresis bondezirojn al la ekstera mondo nome de la bonzinoj de la templo.

Surstrate





Matena sidado



Vespera lecionc



En legoçambro



Preparado de tagmanço



Chongqing

MUNICIPIĜIS CHONGQING

En la Kvina Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, fermita marte de la kuranta jaro, estis aprobita la decido starigi municipon Chongqing. Tiel en Ĉinio nombro de la provinclivelaj unuoj kreskis de 31 al 32, t.e. 23 provincoj, 5 aŭtonomaj regionoj, 4 municipoj kaj 1 speciala administra distrikto.

Chongqing estis urbo de Sichuan-provinco. Post sia municipiĝo ĝi fariĝis la plej granda urbo en Ĉinio. Nun ĝi kovras areon de 82 000 kvadrataj kilometroj, kie vivas 30.02 milionoj da loĝantoj.

Kial Ĉinio municipiĝis ĝin? Unue, Sichuan-provinco, al kiu apartenis Chongqing, estas ĉina provinco kun plej granda loĝantaro. Ĝi havis 120 milionojn da loĝantoj, dekonon de la totala loĝantaro de Ĉinio. La vasta areo kaj granda loĝantaro multe malfaciligas la urban administradon, kaj krome la ekonomio disvolviĝis malegale en diversaj lokoj de la provinco kaj tiu de la orienta parto de Sichuan, kie situas Chongqing, restas postĝinta. Kiel municipo, Chongqing povas ricevi pli da atento de la centra registaro en politiko, investado k.a., kio helpas malgrandigi la diferencon inter okcidenta kaj orienta Sichuan.

La akvoutiliga konstruado en la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero akcelis ĝian municipiĝon. Ĉirkaŭ la akvokonservejo estis pli ol miliono da loĝantoj, kiuj plejparte transloĝiĝos en la municipon Chongqing. Gvidi tiujn loĝantojn kaj la tutan akvokonservejon

de la Tri Gorgoj en unu sama urbo utilas al la konstruado de la akvokonservejo kaj la tuta urbo.

Pro sia favora situo kaj kun solida pez-industria bazo Chongqing estas la plej granda ekonomia centro en sudokcidenta Ĉinio kaj la supra baseno de Yangzi-rivero. Ĝia ekonomia potenciĝo certe impulsos la ekonomian disvolviĝon de la okcidenta parto de Ĉinio.

DEK PROBLEMOJ ATENTATAJ DE LA ĈINAJ URBANOJ

Kiel la ĉinaj urbanoj taksas siajn vivkondiĉojn? Pri kiuj sociaj problemoj ili zorgas? Lastatempe oni faris enketon en 71 urboj de Ĉinio.

En la enketilo estas demando: Ĉu la nuna vivnivelo leviĝis kompare kun tiu antaŭ 5 kaj 10 jaroj respektive? 80.6% de la enketitoj opiniis, ke ĝi rimarkinde leviĝis en la komparo kun tiu antaŭ 10 jaroj kaj 62.6% opiniis, ke ĝi relative pli altiĝis ol tiu antaŭ 5 jaroj.

La dek problemoj plej atentataj estas:


1. Socia stabileco (50.6%).
2. Ekonomia disvolviĝo de la lando (33.8%).
3. Socia sekureco (31.7%).
4. Batalo kontraŭ koruptiĝo (30.3%).
5. Reformado de la kuraca sistemo (26.4%).
6. Prezoj (24.7%).
7. Reformado de la loĝsistemo (20.2%).
8. Reformado de la vivtena garantio por la emeritoj (16.9%).

9. Salajra reformado (16.1%)
10. Edukado de infanoj (11.4%).

TIBETA ARTLERNEJO

La nomita lernejo sin trovas en la antaŭurbo de Lhasa, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.


Ĝi fondita en 1980 estas bazo por kulturi tibetajn kaj ali-nacimalplimultajn meznivelajn artistojn. La gelernantoj tie lernas la tibetan kaj han-an lingvojn, teoriojn pri muziko kaj arto, krom la deviga trejnado de dancado. En la pasintaj 4 jaroj la lernejo elbakis pli ol 60 dancist(in)ojn kaj muzikinstruistojn por diverslokaj lernejoj de Tibeto. Krome, por pli bone konservi kaj disvastigi la originalajn artojn de Tibeto la lernejo faris plurfoje trejnadon al fakaj kaj amatoraj artistoj el foraj lokoj. Multaj



En la Tibeta Artlernejo

el ili estas kantist(in)oj aktivaj sur scenejoj. Post trejnado ilia arta nivelo rimarkinde altiĝis.

Por la 11-a Azia Sportkunveno okazinta en 1990, Pekino, Dawa Yangzong, unu el la kolektantoj de la "sankta fajro", ja estis lernantino de la lernejo. Tiam ŝi faris belan impreson sur la rigardantoj. De ŝi oni iom konis la artlernejon. Depost la azia sportkunveno pli ol 1 400 personoj el 20 landoj vizitis la lernejon. Ĝi fariĝis fenestro por disvastigi la tibetan kulturon kaj arton.



Nova Libro Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ruĝdoma Songô (Volumo II)

"Ruĝdoma Songô" estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj la dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de "Ruĝdoma Songô" estas en tri volumoj. La dua volumo jam aperis kaj la tria aperos en la fino de 1997.

Formato: 14x22 cm. (bind.) 684 pĝ. kun 74 nigraj ilustraĵoj

Prezo: 36.00 USD

- Mendu ĉe:
- Distribua Fako de EPC
 - Libroservo de UEA
 - Nia peranto en via lando

Bonnie Seyfer kaj pekinaj stratetoj

Teksto kaj fotoj de JIAO BO

En strateto de Pekino mi interparolis kun s-ino Bonnie Seyfer.

“Ho, Bonnie, vi bele pentris pekinajn stratetojn kaj bone fotis ilin,” mi laŭdis.

“Ne tiom,” ŝi petole ridetis kaj respondis en la ĉina lingvo.

“Vi bone konas la stratetojn de nia urbo.”

“Ne tiom,” denove aŭdiĝis tiuj vortoj en la ĉina lingvo.

“Vin ne tiom bone impresis la stratetoj, ĉu?”

“Jes ja,” ŝi tuj korektis min, larĝe malfermante sian buŝon kaj ne povante tuj trovi taŭgan vorton por refuti min en la ĉina lingvo.

S-ino Bonnie Seyfer estas magistrino de antikva arkitekturo, deveninta de Minnesota, Usono. En 1988, kiam ŝi unuafoje vizitis Pekinon, ŝi profunde enamiĝis al la pekinaj stratetoj. Kiam komputilo montris ŝiajn fotojn kaj pentraĵojn dum ŝia plua studo, la brila kulturo de orienta nacio vekis en ŝi fortan eksciton. En 1990 ŝi kaj ŝia edzo Harlow venis al Pekino por loĝi por longa tempo. S-ro Harlow laboras en iu kompanio de eksterlandano en Ĉinio, dum Bonnie instruas la usonan literaturon en la Ĉefurba Instruista Universitato. Preskaŭ en ĉiuj ferioj ŝi iris en stratetojn por studi tradiciajn konstruaĵojn de Ĉinio. Ŝi ŝatas precipe pordojn luksajn kaj simplajn de la loĝdomoj kaj tre admiras ilin pro iliaj belaj arkitekturaj trajtoj. Ŝi ilin fotis kaj pentris. Kiam ŝi soifis, ŝi trinkis teon en strata tetrinkejo. Kiam ŝi malsatis, ŝi manĝis vermiĉelojn en tujrestoracio. Komence ŝi ne eniris en la korton kaj fotis pordojn nur fermitajn. Ŝia usona amiko, kiu bone konas Ĉinion, diris al ŝi: “Ĉu la nuna ĉina politiko ne estas tiu de pordomalfermo? Vi povas eniri en kortojn kaj tie foti kaj pentri.” Ŝi faris laŭ konsilo de la amiko kaj eksciis, ke mastroj ne nur lasas ŝin laŭvole foti kaj pentri, sed ankaŭ ĝojas amikiĝi kun ŝi.


“Vi kuraĝas ne nur foti malfermitajn pordojn, sed ankaŭ eniri en kortojn. Kiel saĝa vi estas!” mi laŭdis ŝin.

“Ne tiom,” ŝi ridetis. “Mi enkortigis, sed ne tiom bone studis la stratetojn. Mi jam atingis la aĝon de nekonfuzebleco laŭ ĉina popoldiro, tamen ĉe mia adiaŭo al Pekino mi certe estos pli konfuzita, ol kiam mi venis en la urbon antaŭ kelkaj jaroj...”


Ŝi diris tion serioze.



Parto de kvadrata korto pentrita de Bonnie



Bonnie interesiĝas pri ĉio en strateto.




Bonnie en kvadrata korto

Bonnie antaŭ longhistoria pordo de kvadrata korto



Bonnie ne fremda por loĝantoj de strateto



Niujie, huj-a kvartalo en Pekino

EN Pekino loĝas multaj nacioj, el kiuj la huj-a estas multenombra. Krom tiuj, kiuj mikse loĝas kun aliaj nacioj, ankaŭ la huj-oj havas sian kvartalon — Niujie.

Niujie antaŭe estis mallarĝa strato, situanta en la sudokcidenta parto de Pekino, kiel parto de la malnova urbo. Aspekte ne estas granda diferenco inter ĝi kaj aliaj kvartaloj de Pekino, escepte de la Huj-nacia Elementa Lernejo ĉe la norda fino de la strato, la alta Huj-nacia Hospitalo ĉe la suda fino de la strato kaj amaso da vendejoj de ŝafaĵo kaj bovaĵo ambaŭflanke de la strato. Sur la mallarĝa strato regas vigla trafiko, tamen sen forta bruado. La tradiciaj pekinaj kvadrataj kortoj havas ruĝajn pordojn, sed tiuj en Niujie — verdajn pordojn kun domnumero en la araba lingvo. Sur la strato ĉiam kaj ĉie vidiĝas huj-oj kun blanka ĉapo sur la kapo. Ŝajne ĉio ĉi atentigas, ke tie estas islama loĝkvartalo.

En Niujie loĝas pli ol dekmil islamanoj. Pri formiĝo de Niujie, s-ro Bai, oficisto de la kvartala komitato, kun ĝojo konigis: “Antaŭ tre tre longe tie estis malgranda vilaĝo, abunda je marĉoj. Ĝi tiam havis la nomon “Granata Strato”, kio sentigas ĉarman pejzaĝon de florantaj granatarboj. Poste huj-oj venis ĉi tien por buĉi bovojn kaj vendi bovaĵon kaj tiel la Granata Strato fariĝis Niujie (Niujie signifas “bova strato” en la ĉina lingvo).

En la centro de Niujie estas antikva moskeo, konstruita en la jaro 996, kaj poste estis plurfoje riparita kaj pligrandigita. La nuna konstruaĵo formi-

ĝis meze de la 17-a jc. Ĝi estas fama por la islamanoj en- kaj eksterlandaj pro siaj longa historio, imponeco kaj originaleco. Ĝia arkitektura aranĝo konformas ne nur al la religiaj postuloj, sed ankaŭ al la arkitekturaj trajtoj de la antikvaj ĉinaj palacoj.

Diservo estas grava afero por niujie-anoj en la vivo. En la kultaj horoj maljunaj islamanoj, forlasinte sian laboron, kun blanka ĉapo sur la kapo, iras al la moskeo. Lavinte al si la manojn, piedojn, vizaĝon, kubutojn, naztruojn, buŝon kaj frunton, ili venas al la preĝejo. Antaŭ ĝi ili demetas siajn ŝuojn, stumble pasas tra la ruĝe lakita sojlo kaj surgenuiĝas sur tapiŝoj.

Tiam imamo kun blanka turbano kaj en griza robo antaŭ la preĝvoka turo alvokas la publikon al preĝado. Tuj poste amaso da islamanoj sekvas lin en la grandan halon kaj komencas tie preĝadon. De tempo al tempo aŭdiĝas laŭta voĉlegado de la Korano. Post ĉ. 15 minutoj ili malrapide eliras serenaj, kvietaj kaj kontentaj. Kaj iuj restas tie por aŭskulti predikon pri islamaj scioj. Por ili la kultado estas nepre leciono kaj bela ripozo en la animo.

Menciante sian pilgrimadon al Mekko kaj tranoktadon ĉe la piedo de la sankta monto, ili, radiante de feliĉo, emocie diris: “La imamoj parolis pri la bela Kaabo de generacio al generacio, tamen neniu sukcesis pilgrimi al ĝi. Nur nun realiĝis la revo.”

Tiuj, kiuj ne pilgrimis al Mekko, do ofte pilgrimis al la moskeo de Niujie. La alilokaj islamanoj, venintaj al Pekino, certe vizitas ĝin. Iu pli-ol-70-jara islamano el Xinjiang fotis sin antaŭ la preĝejo kaj preĝvoka turo.

En Niujie-kvartalo loĝas ankaŭ alinacimalplimultanoj kaj han-oj, tamen la islamanoj estas aparte respektataj, sekve ili vivas harmonie. Ekz. tie oni ne dancas Yangge nek dancas en rondo, kiuj furoras en aliaj kvartaloj de Pekino, ĉar oni scias, ke islamanoj kutimas al kvietaj vivo, kaj tabako kaj vino ne estas licaj ĉe ili.

La moskeo ĉe Niujie-strato



Junaj islamanoj kreskas kiel infanoj de aliaj nacioj. Ili lernas en lernejo, laboras en oficejo aŭ sin okupas je diversaj laboroj. En vendredo, fasta monato kaj Korban-festo ili kun siaj gepatroj iras al la moskeo.

Niujie-anoj diris, ke post 3-5 jaroj la strato estos larĝigita, novaj domoj anstataŭos la malnovajn kaj en la preĝejo daŭros laŭta voĉlegado de la Korano. Kiel unu el la kulturaj kaj turismaj lokoj de Pekino, la kvartalo altiros al si pli da homoj, kiuj ĝuos tie malsaman kulturan atmosferon. Tia peco kaj kvieteco ekzistos daŭre. ■

20 sanigaj ekzercoj

(IV)

ĈI-SUBE koniĝas la 15-19-aj ekzercoj. La 15-a ekzerco supligas la lumbojn, koksojn, maleolojn, genuojn, *ginglulo*-vojojn kaj muskolojn de la gamboj. La 16-19-aj ekzercoj estas utilaj por ekzerci la iliakajn, genuajn kaj maleolajn artikojn. Ili efikas ankaŭ por preventi kaj kuraci malfortigon de la piedoj kaj genuoj, ostoproliferadon, rigidigon de artikoj kaj facilan laciĝon pro piedirado. Ili estas utilaj ankaŭ al kuraco de doloreto en la koksoj, genuoj kaj maleoloj, reŭmatismo kaj lezaj sekvaĵoj.

Dekkvina ekzerco

Staru kun la piedoj disigitaj kaj la manoj ĉe la talio.

Turnu vin dekstren kun la antaŭa piedo frotanta la plankon, fleksu viajn genuojn kaj kaŭriĝu. Apogu vian maldekstran genuon sur la dekstra kruro, kun la dekstra pugno ĉe la talio. Etendu vian maldekstran pugnon de la maldekstra lumbo antaŭen-dekstren, kun la brako paralela kun la ŝultroj (Bildo 22). Faru la samon en la alia flanko.

Atentu, ke vi devas fari la suprajn movojn malrapide kaj stabile kaj spiri nature. La 15-a ekzerco estas malfacile farebla, tial la maljunuloj povas fari ĝin iom post iom surbaze de aliaj ekzercoj.

Deksesa ekzerco


Staru kun la piedoj disigitaj je granda paŝo kaj la manoj ĉe la talio.

Fleksu vian maldekstran kruron kaj rektigu vian dekstran (Bildo 23).

Reprenu la originan teniĝon. Faru tion en ambaŭ flankoj alterne. Faru la suprajn movojn ne tre rapide, kun korpo rekta, okuloj rigardantaj antaŭen kaj kruroj stabile starantaj. Ne tre malalte fleksu viajn genuojn. Enspiru ĉe la genu-fleksiĝo kaj elspiru ĉe la repreno de la origina teniĝo.


Deksepa ekzerco

Staru rekte kun la kalkanoj kune metitaj, genuoj iom fleksitaj kaj korpo iomete klinita antaŭen. Masaĝu la genuojn per viaj manoj kaj poste metu la manojn sur ilin, kun okuloj rigardantaj antaŭen-malsupren (Bildo 24).




Bildo 22

Dekkvina ekzerco



Bildo 23

Deksesa ekzerco




Bildo 24

Bildo 25

Bildo 26

Deksepa ekzerco

Dekoka ekzerco



Bildo 27

Bildo 28

Deknaŭa ekzerco



Bildo 29

Bildo 30

Turnu viajn genuojn de maldekstre antaŭen, dektrajn kaj malantaŭen kelkajn fojojn kaj poste faru la samon en inversa direkto (Bildo 25). Farante la suprajn movojn, vi devas stari stabile, premi malforte la genuojn per viaj manoj, ne tre malalten klinu vian kapon. Ĉiufoja spirado samtempas kun genu-turnado kaj faru la turnadon pli kaj pli larĝa.

Dekoka ekzerco

Staru kun la piedoj disigitaj en la distanco de la ŝultroj kaj la manoj ĉe la talio.

Kaŭriĝu kiel eble plej malalten, por ke viaj kalkanoj tuŝu la gluteojn, kaj levu viajn brakojn antaŭen-herizontale (Bildo 26).

Reprenu la originan teniĝon. Enspiru, kiam vi kaŭriĝas, kaj elspiru, kiam vi stariĝas. Staru rekte, klinu vin nek antaŭen nek malantaŭen. Kaŭriĝu tiom da fojoj kaj tiom malalte, kiom vi povas.

Deknaŭa ekzerco

Staru kun la piedoj kune metitaj kaj la manoj ĉe la talio kun la dikfingroj malantaŭen.

1. Levu vian maldekstran gambon kun la kruro rektigita. Ĵetu antaŭen vian maldekstran piedon kun la pinto rektigita kaj pieddorso streĉita.

2. Mallevu vian maldekstran piedon kaj levu vian dekstran gambon. Ĵetu antaŭen vian dekstran piedon (Bildo 27).

3. Mallevu vian dekstran piedon kaj ĵetu malantaŭen vian maldekstran piedon tiel, ke la kalkano tuŝu la gluteon.

4. Mallevu vian maldekstran piedon kaj ĵetu malantaŭen vian dekstran piedon (Bildo 28).

5. Mallevu vian dekstran piedon kaj ĵetu internen vian maldekstran piedon (Bildo 29).

6. Mallevu vian maldekstran piedon kaj ĵetu internen vian dekstran piedon.

7. Mallevu vian dekstran piedon kaj levu vian maldekstran gambon. Ĵetu eksteren-herizontale vian maldekstran piedon (Bildo 30).

8. Mallevu vian maldekstran piedon kaj ĵetu eksteren-herizontale vian dekstran piedon.

Faru la supre menciitajn 8 movojn en grupoj: Faru la 1-an kaj 2-an; la 3-an kaj 4-an; la 5-an kaj 6-an; la 7-an kaj 8-an; po 8 fojoj por ĉiu grupo. Enspiru, kiam vi komencas ĵetadon, kaj elspiru, kiam vi mallevas la piedon. Ĵetu ne tre forte, kun la supra korpo rektigita kaj okuloj rigardantaj antaŭen, kaj ne klinu la kapon.

Faru reguligadon laŭ la movoj montritaj en "20 Sanigaj Ekzercoj" de n-ro 1, 1997. ■

WANG HANPING:

Leĝoj en Ĉinio

EN marto 1997 okazis la Kvina Plena Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso, la plej alta instanco de Ĉinio. Pli ol 2 700 partoprenantoj diskutis kaj voĉdone aprobis la metodon de elektado de reprezentantoj de la Speciala Administra Distrikto de Hongkong al la Naŭa Tutlanda Popola Kongreso, la Leĝon de Naci-defendo de Ĉinio kaj la reviziitan Kriminalan Leĝon. De 1979 ĝis 1997 la Popola Kongreso donis entute 311 leĝojn. Ĝi ĉiujare okazigas sesion por diskuti la gravajn politikojn kaj doni bazajn leĝojn.

Post sia fondiĝo en 1949, la Ĉina Popola Respubliko donis serion da gravaj leĝoj, inkluzive la Konstitucion, kiuj, kvankam neperfekta, estis tre gravaj por la stabileco kaj sekureco de la lando. Sed poste pro historia kaŭzo kaj neglekto de la leĝa sistemo aperis fenomeno "potenco pli forta ol leĝo". Dum longa tempo de la kultura revolucio, eĉ okazis neniuj Popolaj Kongresoj kaj estis donita neniuj nova leĝoj. Tiam oni ne povis libere doni sian opinion kaj la tuta lando estis en ĥaoso.

Post la finiĝo de la kultura revolucio rekomenciĝis konstruado de la leĝa sistemo de Ĉinio. La politiko estas "Leĝoj estu bone, nepre obeataj kaj serioze praktikataj, atencantoj de leĝoj nepre punataj." Estas praktikataj leĝoj civila, komerca, kriminala, administra, ŝtat-struktura kaj aliaj, por ke ĉio iru bonorde. Kaj la Kriminala Leĝo klare difinis punon al krimuloj, kaj libervola verdikto estas laŭeble evitata.

Ĉinio longe praktikis planizitan ekonomion,



La Popola Kongreso aprobas la Kriminalan Leĝon de Ĉinio.

kiu siatempe ludis pozitivan rolon por evoluo de la ŝtata ekonomio, tamen tiu ekonomia sistemo ebligis al la registaro kaj la ŝtatoficistoj havi la povon decidi ĉion de entreprenoj, do persona volo povis influi la ekonomion. Rimarkinte la malavantagon, Ĉinio reformis la ekonomian strukturon kaj ekaplikas merkatan ekonomion, kiu tamen bezonas taŭgan leĝan sistemon.

En la Unua Plena Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso en 1993 oni prenis leĝdonadon precipe pri ekonomio kiel sian plej gravan taskon, kaj la laboro rapide progresis en la pasintaj kvar jaroj. En 1996, 20 leĝoj kaj kodoj estis aprobitaj, inkluzive leĝojn pri aŭkcio, advokato, mineralaj riĉfontoj, prevento de polucio de akvo kaj defendo de interesoj kaj rajtoj de maljunuloj. La lasta klare difinas, ke maljunuloj rajtas ricevi vivtenon de la familio kaj havi socian garantion, kaj tiuj, kiuj agas kontraŭ leĝaj interesoj de maljunuloj, estos punataj. Estas ankaŭ la Leĝo de Profesia Edukado, kiu difinas, ke civitano rajtas ricevi profesion edukadon. Ĝi estas grava parto de leĝoj pri edukado.

Inter la 95 leĝoj kaj kodoj aprobitaj de la Popola Kongreso en la pasintaj kvar jaroj 39 koncernas la merkatan ekonomion, kiel tiuj pri kompanio, buĝeto, komerca banko, reklamo, asekuro kaj praktikado de urbaj dom- kaj bien-proprietoj. Kaj ĉi-jare oni faros pliajn 30 leĝojn kaj kodojn pri valorpapero, bankroto ktp.

Pro rapida evoluo de la socio multaj leĝoj de Ĉinio ne plu taŭgas. Ekz. la Kriminala Leĝo aprobita en 1979 ne havis detalan difinon pri puno al

krimuloj nek donis pezan punon al gravaj krimoj pri narkotaĵo. Tiam en Ĉinio ankoraŭ ne ekzistis krimoj pri valorpapero kaj komputilo. La reviziita Kriminala Leĝo, kiu havas 452 artikolojn (antaŭe 192), emfazas la principojn, ke tiuj, kiuj ne atencas la leĝon, ne ricevos punon; ĉiuj estas egalrajtaj antaŭ la leĝo; kaj la puno devas respondi al la krimo. Tiuj principoj defendas la rajtojn de koncernatoj. La revizio de la Kriminala Leĝo konformas al la evoluo de la merkata ekonomio en Ĉinio kaj al ties principo “publike, egale kaj juste”.

Por ke la leĝoj estu obeataj, la Popola Kongreso multe kontrolas la praktikadon de la leĝoj pri agrikulturo, medioprotekto, edukado, defendo de rajtoj kaj interesoj de aĉetantoj ktp. Koncernaj instancoj pli bone praktikas leĝojn kaj la popolo pli multe konas la leĝan sistemon.

En sinsekvaj tri jaroj post publikiĝo de la Agrikultura Leĝo en 1993 la Popola Kongreso kontrolis ĝian praktikadon kaj rimarkis, ke ne sufiĉas investo por agrikulturo, kaj kamparanoj estas tro ŝarĝitaj ktp. Do ĝi postulis koncernajn departementojn solvi la problemojn laŭ la leĝo.

Tre gravas la kvalito de la praktikantoj de la leĝo, inkluzive tiun de prokuroro, juĝisto, advokato ktp. Nun en Ĉinio estas pli ol 8 000 advokatejoj kaj pli ol 100 000 advokatoj. La leĝ-helpa sistemo formiĝis kaj estis konfirmata en la leĝoj pri advokato kaj kriminala proceso. Ĝi helpas malriĉulojn, handicapulojn kaj aliajn, por ke ili povu esti defendataj de la leĝoj.

En 1996 oni komencis la trian Kvin-jaran Programon pri Diskonigo de Leĝoj. Nun multaj homoj scias defendi siajn interesojn per leĝoj kaj tre atentigas la evoluon de la leĝa sistemo de Ĉinio.

En konstruado de la leĝa sistemo de Ĉinio oni devas plifortigi praktikadon de leĝoj kaj kompletigi la kontrolan sistemon. Nur tio kondukas al la celo — laŭleĝe regi la ŝtaton. ■

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el “El Popola Ĉinio” kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenon.



Korpo-ekzercado

YI ZHOU:

Diligentaj ekzercantoj de tajĝjiĉuan

EN Zhongguancun laboras kaj loĝas sciencistoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Najbare de la Pekina Universitato, Qinghua-universitato kaj aliaj superaj lernejoj nord-okcidente de Pekino, ĝi portas ankaŭ la nomon scienca urbo.

Tie troviĝas ne nur famaj sciencaj institutoj, sed ankaŭ tajĝjiĉuan-asocio, kies membroj plejparte estas sciencistoj. Al ĝi aliĝis ankaŭ vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, akademianoj, profesoroj kaj esploristoj. Kial ili inklinas al tajĝjiĉuan-ekzercado? Oni diris al mi, ke multaj el ili, absorbigante en faka laboro, neglektis ripozon kaj fizikan ekzercadon, pro tio ili suferis tiun aŭ alian malsanon. Por pli bone labori kaj feliĉe vivi ili nepre devas fari fizikan ekzercadon. Kial do ili preferas tajĝjiĉuan? Ĉar ĝi tre utilas al la harmonia kunlaboro de diversaj visceroj, reguligo de la centraj nervoj, reordigo de la funkcio de la internaj organoj, plibonigo de la funkcio de mikrocirkula sistemo kaj mildigo de la streĉiteco kaŭzita de pena laborado. Tial ĝi helpas al korpo-sanigo kaj prevento de malsanoj. Krome, tajĝjiĉuan-ekzercado ne estas limigita de la spaco kaj aliaj kondiĉoj. Kun malrapidaj movoj ĝi taŭgas precipe al mezaĝaj kaj maljunaj homoj.

En 1995 koncerna departemento de Ĉinio faris enketon pri 10 institucioj, kie laboris intelektuloj. La enketo montras, ke inter iliaj laborantoj la malsanuloj estas pli multaj ol tiuj en aliaj servolokoj, kaj la averaĝa vivdaŭro de la laborantoj estas malpli longa ol tiu de la tutlanda popolo. La morto de intelektuloj en kompare juna aĝo vekis atenton de koncernaj departementoj, dum la intelektuloj mem konsciis la gravecon de fizika ekzercado. Tial ili komencis fari sportojn konvenajn al iliaj labor-traĵtoj kaj sanstato.

Tajĝjiĉuan ja estas unu el la sportoj plej ŝatataj de ili. Tuj ĉe la alvoko de la asocio, ili konkure sin anoncis por partopreni en la ekzercado. Nun tajĝjiĉuan-ekzercado estas multe farata en la scienca urbo.

54-jara supera inĝenierino He Weilang diris al mi, ke ŝi estis grave malsana kaj je la menso kaj je la korpo en aĝo de pli ol 30 jaroj. Influate de aliaj, ŝi komencis fari tajĝjiĉuan-ekzercadon, kaj ŝia sanstato mirinde pliboniĝis iom post iom. Post ŝi, pli kaj pli multe da homoj ekekcercis sin per tajĝjiĉuan. Vigla kaj sana, ŝi bone laboras kaj multe kontribuas al la scienca laboro. Nun ŝi funkcias ankaŭ kiel ĝenerala sekretario de la Uŝu-a Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Ja estas multaj similaj ekzemploj. La serena ridado kaj gaja mieno de la laborantoj montras, kiom da vikleco donas al ili la sportoj. Nun ili estas viglaj kaj energiplenaj homoj.

Nun la asocio havas pli ol 500 membrojn kaj milojn da ekzercantoj. Pluraj veteranaj membroj fariĝis trejnistoj de tajĝjiĉuan-ekzercado. En la scienca urbo troviĝas dekelkaj trejnejoj. Ĉiutage, ĉe matenkrepusko, oni iras al trejnejo por fari tajĝjiĉuan-ekzercadon. Ili persistis en la sporto jam dekelkajn jarojn. Nun la matena tajĝjiĉuan-ekzercado allogas jam kiel spektaklo en la nomita urbo.

En la komenco ili volis nur sin sanigi pere de tajĝjiĉuan-ekzercado, sed tute ekster ilia atendo, nun oni ofte invitas ilin al konkurso kaj prezentado. Al la inaŭguro de la 11-a Azia Sportkunveno la asocio sendis 130 homojn por fari prezentadon de tajĝjiĉuan. ■

Klozonea kruĉo

Klozoneo estas speco de emajlo. Ĝia arto komencis disvolviĝi en la reĝperiodo de imperiestro Jingtai (1450-1456 sur trono) de Ming-dinastio (1368-1644). La klozoneaĵoj plejparte estas bluaj. Por fari ilin necesas antaŭ ĉio havi modelon el kupro kaj luti vertikale sur la fono desegnojn el maldikaj kupraj lamenetoj farbitaj, kaj poste baki, poluri kaj orumi ilin. Ĉiuj klozoneaĵoj, faritaj en Pekino, estas imponaj kaj versimilaj.


Tiu ĉi klozonea kruĉo estas farita de la Pekina Metiartaĵa Fabriko.





Sunleviĝo

de SALIKO (Finnlando)



Ĉe Össjöasjön-
lago
de MALTE
MARKHEDEN
(Svedio)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第七期
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2